

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Kunpromenu en
la finna kulturo**

UN 50-jara

**E-dezerto en
Centra Ameriko**

**Finnlando:
pli varmos en Tampereo!**

Enhavo

- 21 Nia kongreslando: La urbo kun ducent lagetoj (Jukka Laaksonen); La lando inter Svedio kaj Rusio (Kalle Kniivilä); Libro el la kongreslando; Kie kulturo kaj naturo kunas (Osmo Buller); La afablaj arbaranoj (Georgo Kamaĉo)
- 26 Ameriko: Kiel verdigi dezerton? (Philippe Chavignon); Kiel verdigi fekundejon?
- 27 Kulturo: Itala E-biblioteko nun publika
- 27 Instruado: Usona rekordo; Jubilea jarfino en Japanio (EPA)
- 28 Muziko: "La vojo", 13 fojojn
Lingvo: Ĉu meti aŭ ne meti?
- 29 Historio: Sur la spuroj de Nobel-premiitoj
- 30 Kongresa temo: "Ni, la popoloj" — unu mondo aŭ disaj eroj? (Mark Fettes)
- 31 Junularo: "UN-sembleo" por gejunuloj (Geoffrey Greatrex); TEJO sur la eŭropa scenejo (Anna Ritamäki)
- 32 Recenzoj: *Kompreni* (Wouter F. Pilger); *Silka kuseno*, *Unumane* (Aleksandar Šivarov); *Procesio multkolora*, *Tohuvabohuo* (Franz Georg Rössler); *Por vidi la mondon*, *Laŭ lula ondo* (Aleksandr Melnikov); La franca sorĉkastelo (Les Hartridge)
- 34 Laste aperis
- 35 Kotiztabelo de UEA por 1995
- 36 Reagoj
- 37 Fake — Loke
- 38 Str-angulo
- 39 Oficiala informilo
- 40 Anoncetoj; Nekrologoj

Vi trovus

nuntempe tutan invadon da bondeziriloj sur la muroj de nia kafĉambro, se vi vizitus la Centran Oficejon. Elkoran dankon — kaj reciproke! Sed jam alvenas nova okazo por saluti amikojn (ne nur esperantistajn): la Internacia Semajno de Amikeco (19-25 februaro). Trafa momento por lokaj aranĝoj kun translima karaktero, kiajn la komunikiloj volonte atentis!

En la januara tago de nia redaktofino la Tamperea UK jam nombras 1500 aliĝintojn: tio superas la averaĝon de la lastaj jaroj. Ne timu do esti soleca en Finnlando! Se vi ankoraŭ ne decidis alvojaĝi, eble nun vi akceptos nian inviton (p. 21-25) — ĝis la 31-a de marto validas favora aliĝ-tarifo.

En septembro ni demandis: ĉu ni aperigu prononc-indikojn post ne-Esperantaj propraj nomoj? Ni daŭre atendas vian reagon. Se vi opinias jese, vi povus ekde nun mem aldoni la necesajn indikojn en viaj artikoloj!

La kovrilo: Saŭnofina plezuro. (Helsinki Finland Congress Bureau.)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 436 10 44; 436 15 39.

Telefakso: (010) 436 17 51.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estrarano de UEA

Prezidanto (kunordigado, reprezentado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. +44/(0)81/542-03-02; fakso 715-40-10.

Vicprezidanto (landa kaj regiona agado): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, DE-51069 Köln, Germanio; tel. +49/(0)221/680-32-50.

Ĝenerala Sekretario (informado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark T. Fettes, 158 A Henderson Avenue, Ottawa, Ontario, Kanado K1N 7P6; tel. +1/613/565-92-82; fakso 565-92-79.

Estrarano (financo): s-ro Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; tel. +31/(0)20/642-18-53.

Estrarano (azia agado): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul — 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj fakso +82/(0)2/646-54-13.

Estrarano (kulturo, kongresoj): s-ino Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39/(0)6/39-72-61-98; fakso 39-72-61-69.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ino Marija Belošević, Sveti duh 130, Črnomorec, HR-41000 Zagreb, Kroatio; tel. +385/(0)41/576-092; fakso 428-847.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Danny ten Haaf, Clarensteeg 2 G, NL-2312 WJ Leiden, Nederlando; tel. kaj fakso +31/(0)71/148-801.

La urbo kun ducent lagoj

Du grandaj lagoj kiujn apartigas grua terspino kaj kunigas forta rapidfluo. Tia estis la unua pejzaĝo por la fiŝkaptantaj kaj ĉasantaj vaguloj kiuj iam antaŭ du mil jaroj alvenis al la loko kie situas la nuna urbo Tampere.

Tiam ekzistis eĉ ne padoj tra arbaroj: la eksterordinaraj lagoj kaj fluoj de la regiono estis la solaj uzeblaj vojoj. Riĉaj trovaĵoj el la ŝton-epoko pruvas ke la ĉirkaŭaĵo estis inter la unuaj konstante loĝataj en Finnlando. Jam dum la mezepoko la regiono prosperis, kvankam ial ne naskiĝis urbo en ĝi. Pasis jarcentoj antaŭ ol oni rimarkis la verajn eblojn de la regiono. La ŝlosila fenomeno estis industrio. Ĝi volis ĉerpi facilan energion de la etaj akvofaloj kaj de la mallongaj sed torentaj fluoj kiuj estas oftaj en la finna lagoregiono.

pli internacia urbo ol nun, kiam ĝi denove komencas ricevi eksterlandan loĝantaron, sed pro aliaj kaŭzoj. La industrio dungis dum jardekoj duonon aŭ eĉ du trionojn de la loĝantoj. La kelkmilhoma “vilaĝo” de la jaro 1860 fariĝis centmilhoma eta grandurbo en la daŭro de 90 jaroj.

Tampere ĉefrolis en ekutiligo de gravaj inventaĵoj. Elektran lumigon ĝi ricevis en 1882 kvine en Eŭropo post Parizo, Strasburgo, Milano kaj Londono, telefonon unu jaron poste, kaj radiostacion la unua en Finnlando, en 1923. En la urbo antaŭe funkciis

Malgraŭ la manko de longa kultura tradicio, la kulturo ĉi tie estas sufiĉe forta. La pinta fako estas certe teatro, sed ankaŭ aliaj estas nuntempe bone reprezentataj. La nova koncerta kaj kongresa halo, nia kongresejo, jam gastigis multajn mondfamajn artistojn, ensemblojn kaj orkestrojn.

Tampereanoj, precipe la denaskaj, ŝatas sian urbon. Ĝi estas nek tro malgranda, nek tro granda. Ĝi konvenas por loĝi, vivi, labori kaj libertempadi.

Tampere ne estas tipa malpura industria urbo. En ĝi naturo ĉiam kuŝas proksime, kiel ĉie en Finnlando: post duonhora promenado vi trovos vin en sovaĝa arbaro, kie la bruo de trafiko ne plu aŭdeblas. Tampere krome havas la plej belan naturan parkon de la lando, tuj en sia centro. Inter la urbaj limoj troveblas preskaŭ 200 lagoj kaj lagoetoj! Arbaroj kaj lagoj freŝigas la aeron.


Tampere estas vasta urbo: ĝi etendiĝas ĝis 20 kilometrojn en orient-okcidenta direkto kaj pli ol 10 en nord-suda. Multaj loĝas en unufamiliaj domoj, kaj oni facile trapromenas la centron.

Kaj finfine, kion diri pri la tampereanoj? Laŭ iuj anekdotoj ili estas malrapidaj, silentemaj, sed persistaj: tipaj finnoj. Do pretiĝu iom atendi ilian respondon; ĝin vi aŭdos kiam ili jam taksis la demandon ĉiufanke.

Vi malfacile boriĝos tra la ŝelo de tampereano, sed oni ja ne punos vin pro klopodoj. Por konatiĝi vi povas eble komenci parolante — nemirinde — pri la vetero. Poste povos temi pri teatro aŭ pri glaciĥokeo, la “propra” sporto de tampereanoj. Ne senluziĝu tro rapide! Kvankam tampereano tion ne dirus, li en siaj pensoj bonvenigas vin, ĉar ĝenerale finnoj interesiĝas pri ĉio eksterlanda. Iam eĉ tro — por konстати tion sufiĉas rigardi la nomojn de la vendejoj kaj iliajn montrofenestrojn.

Do, en Tampere ne klopodu serĉi metropolon, aŭ eĉ gravan kruciĝon de la monda trafiko. Ankaŭ ne serĉu antikvaĵojn, ĉar ilin vi apenaŭ trovos. Multaj eksterlandanoj opinias ke la finnaj urboj estas iel amerikaj — tamen sen nubskrapaj domblokoj. Post la mondfama Vieno, sud-temperamenta Valencio kaj svarmanta Seulo, estu bonvena viziti komfortan, progreseman kaj iniciateman urbon meze de tipaj finnlandaj pejzaĝoj!

Jukka Laaksonen (Finnlando)



En nia kongresurbo naturo ĉiam kuŝas proksime.

Tampere, kies fondo-dekreton subskribis la sveda reĝo Gustavo la 3-a en 1779, fariĝis la unua industria centro de la lando. Preskaŭ jarcenton Tampere sola en Finnlando povis ĝui la statuson de libera urbo: oni rajtis senimposte starigi kaj funkciigi fabrikojn kaj sendogane importi kaj eksporti varojn. Tiu privilegio sendube esence influis la rapidan kreskon, precipe dum la dua duono de la 19-a jarcento. Tampere fariĝis ankaŭ unu el la ĉefaj centroj de la laborista movado. Multaj eksterlandaj teknikistoj kaj inĝenieroj helpis starigi la finnan industrion. Fakte, antaŭ cent jaroj Tampere estis eĉ

grandaj metal-, teksaĵ-, paper- kaj ŝu-industriaj uzinoj, sed la nuntempa industrio estas klare pli malgrandskala kaj aplikadas pintan teknologion. La altan nivelon de inĝenieroj prizorgas la loka teknika altlernejo kaj la plej malnova teknika instituto de la lando.

Ĉiam mankis al Tampere rekta kontakto kun la maro, sed laŭ ŝerco la urbo havas eĉ kvar bonajn havenojn diversflanke ĉe la maro. Tampere ne niam estis grava administra centro, kaj eble pro tio la loĝantoj ofte opinias sin neglektataj de la ŝtataj instancoj. Tio tamen naskis fortan iniciatemon por unikaj konstruprojektoj.

Antaŭ la estiĝo de la moderna ŝtato Finnlando, la teritorio estis dum pli ol duona jarmilo regata el Svedio, kaj dum pli ol jarcento el Rusio. La prauloj de la finnoj almigris el la oriento, sed la kulturon ni prenis ĉefe el la okcidento.

Ĝis 1809, kiam Rusio konkeris ĝin dum la Napoleonaj militoj, Finnlando estis simple la orienta parto de la sveda regno. Oficiale eĉ lingve ĝi ne multe diferencis de la cetera reglando — la finna ĝuis nenian rekonon.

Dum la rusia regado la finnoj restis lojalaj, kaj rekomence rajtis teni sian konstitucion, kiam en Rusio eĉ paroli pri konstitucio estis malpermesate.

Post la rusia revolucio de 1905 la finnlandanoj sukcesis havigi al si pliajn rajtojn. En 1906 Finnlando kiel la unua en Eŭropo enkondukis vere ĝeneralan kaj egalan elekto-rajton — ankaŭ virinoj rajtis voĉdoni. En la unuaj elektoj (1907) la socialdemokratoj iĝis la plej granda partio.

Lige kun la sekva rusia revolucio, la aŭtonoma grandduklando Finnlando sendependiĝis en decembro 1917. En januaro 1918 la socialistoj per puĉo kaptis la povon en Helsinko, kaj sekvis interna milito. Sin reciproke buĉis la finnaj ruĝuloj kaj blankuloj, kaj en Tampere okazis la plej granda batalo de la ĝistiam nordia historio. La interna milito lasis en la socio profundajn vundojn.

Post la interna milito la regantoj tre favore sin tenis al Germanio, ĉar de tie ili dum la milito ricevis helpon. Oni decidis igi la ĵus sendependiĝintan Finnlandon reĝlando, kaj eĉ elektis germanan princon reĝo. Germanio tamen malgajnis la unuan mondmiliton. Finnlando iĝis respubliko, kaj la taskojn de reĝo ricevis la prezidento.




Foto: Mari Palosaari

La lando Svedio

Pri multaj landoj oni diras ke ili estas pontoj inter oriento kaj okcidento. Almenaŭ kiam temas pri Finnlando, tio ne estas nura pretendo.

Minacata demokratio

La finna lingvo jam fine de la pasinta jarcento ricevis statuson oficiale egalan kun la sveda. La svedan tamen parolis kaj daŭre parolas relative granda minoritato (6%), kaj ĝi daŭre estas unu el la du oficialaj lingvoj de la lando.

Dum la jaroj 20-30 estiĝis dekstremaj naciismaj organizoj, kiuj interalie instigis kverelojn kontraŭ la svedlingvanoj. En 1930 oni post longa kampanjo de la dekstruloj malpermesis la agadon de la komunistoj, sed en 1932 la dekstro post nesukcesa puĉo grandparte perdis sian influon.

En Finnlando la demokratio ne pereis dum la 30-aj jaroj, eĉ ne dum la posta milito: fine de la 30-aj ĝi estis fakte pli firma ol iam antaŭe. La landon regis koalicio de la kamparana partio kaj de la socialdemokratoj.

Eĉ pli firmigis la socion la atako de Sovetio en 1939. Dum longa intertraktado aŭtune 1939 Sovetio postulis de Finnlando cedon de teritorio, kaj novembre Stalino transiris de vortoj al armiloj. Li tamen vane esperis helpon de la finnaj komunistoj: la tuta popolo unuanime partoprenis en la t.n. “vintra milito” kontraŭ la agresinto.

Stalino ne sukcesis konkeri Finnlandon, sed ja estis ceditaj teritorioj, i.a. la dua urbo de Finnlando, Viborgo (finne Viipuri). Finnlando komencis serĉi apogon de la faŝisma Germanio. En 1941 Finnlando partoprenis en la Hitlera atako kontraŭ Sovetio, unue por rekonkeri siajn perditajn teritoriojn, sed poste por konstrui “Grand-Finnlandon”.

Germanio tamen denove malvenkis, kaj Finnlando devis ekkonstrui novajn rilatojn kun sia granda najbaro. En la pactraktato Finnlando cedis pluajn teritoriojn al Sovetio, sed la lando estis neniam okupita de sovetiaj trupoj.

Strebo al neŭtraleco

Post la milito la komunistoj denove rajtis agadi, kaj komence ili havis grandan influon. En 1948 estis subskribita traktato pri amikeco, kunlaboro kaj interhelpo kun Sovetio, kaj dum multaj jardekoj bonaj rilatoj kun Sovetio estis la fundamento de la finnlanda ekstera politiko.

Kvankam la demokratio neniam endanĝeriĝis, Sovetio ofte senteble influis ankaŭ la internan politikon. En 1962 Sovetio forte reagis kontraŭ koalicio de socialdemokratoj kaj dekstraj burĝaj partioj, kiuj celis malhelpi la reelekton de prezidento Urho Kekkonen (1900-1986). La koalicio dissolviĝis kaj Kekkonen estis reelektita.

inter kaj Rusio

Kekkonen, kiu sciis varti la delikatajn rilatojn de Finnlando al Moskvo, restis prezidento dum kvarona jarcento, de 1956 ĝis malsaniĝo en 1981. Precipe pro sia lerta ekstera politiko, Kekkonen ekhavis escepte fortan povon ankaŭ en la interna politiko.


Dum la tempo de Kekkonen la internacia pozicio de Finnlando daŭre fortiĝis. En 1975, kiam la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo estis fondita en Helsinko, la neŭtraleco de Finnlando estis vaste rekonita.

Al Eŭropa Unio

Ekde marto 1994 la postenon de prezidento okupas Martti Ahtisaari, socialdemokrato naskita en Viborgo. La duan lokon en la prezident-balotado ricevis la defend-ministro Elisabet Rehn. Tian sukceson de svedlingva virino oni opiniis signo de la finnlanda egaleco.

Krom politikan, Sovetio havis ankaŭ grandan ekonomian signifon por Finnlando. La drasta malkresko de la komerco kun Sovetio/Rusio post la 80-aj jaroj profundigis la ekonomian krizon, kaŭzitan de la internacia konjunkturo, kaj la senlaboreco atingis rekordon: de 3,4% en 1990 ĝi altiĝis en tri jaroj al 22%.

Tre grava diskuttemo dum la pasinta jaro estis la membreco de Finnlando en EU, kiun referendumo jesis en oktobro. La aliĝo de Finnlando kaŭzas aktualan problemon de la internacia vivo: ĉu la prezidento aŭ la ĉefministro



reprezentu la landon ĉe oficialaj EU-renkontiĝoj, kaj precipe dum la solenaj vespermanĝoj. Laŭ la ĉefministro la politika apetito de prezidento Ahtisaari estas tro granda.

Kalle Kniivilä (Finnlando)

Libroj el la kongreslando

Suomi-esperanto-suomi. J. Vilkki, H. Favén. Ampleksa dudirekta poŝvortaro. 1982 (2-a eld.). 449p. 45,00 gld.

Malŝlosilo finna. Vortareto finna-Esperanto. 1977. 32p. 3,00 gld.

Nova ŝlosilo por finnoj. Vortareto Esperanto-finna. 1978. 34p. 3,00 gld.

Kalevala. Trad. J.E. Leppäkoski. La nacia epopeo, kies kantoj legiĝas kvaŭ romano pri aventuroj en magia mondo. Juvelo de la Esperanta tradukarto. 1985 (2-a eld.). 392p. Ilus. Bind. 22,50 gld.

Iu finna infanaĝo. E. Rasku. Rememoroj. 14p. 3,00 gld.

Interrilatoj. Aira Kankkunen. La unua libro de la Nova Talento de 1992, kun delikataj, meditemaj poemoj. 1993. 89p. 13,80 gld.

La botistoj. Aleksis Kivi. Trad. H. Hall. Komedio kiu fondis la finnan teatron. 1919. 142p. 3,90 gld.

Batalo pri la domo Heikkilä. Johannes Linnankoski. Trad. Vilho Setälä. Streĉe verkita romaneto pri tragedio en kamparo. 1919. 69p. 3,90 gld.

La kanto pri fajr-ruĝa floro. Johannes Linnankoski. Trad. E. Kuopala kaj J. Jäntti. Vivplena romano pri finna donĵuano. 1978. 134p. 17,10 gld.

Burĝonoj. Albumo de infanfotografioj de Vilho Setälä, renoma fotisto, kun lirikaj poemoj. Trad. Setälä kaj Leppäkoski. 1950. 80p. 11,10 gld.

La frato. E. Rasku. Rememoroj pri milite mortinta frato. 1991. 20p. 7,50 gld.

Kie boacoj vagadas. Eija Salovaara. Fascinaj originalaj rakontoj pri vagadoj de la aŭtorino en Laponio. 1994 (2-a eld.). 91p. 21,00 gld.

Sep fratoj. Aleksis Kivi. Trad. I. Ekström. Humurplena romano pri vivo en nordaj praarbaroj en la 19-a jarcento. 1947. 360p. Ilus. Bind. 35,10 gld.

Spegulo homarana. J. H. Erkko. Trad. V. Setälä. Poeziaj aforismoj de grava verkisto. 1946. 32p. 3,60 gld.

La finna vojo. Urho Kekkonen. Trad. Osmo Buller. Studo de la iama prezidento pri la neŭtraleco de Finnlando kaj ties rolo en la mondo. 1989. 109p. 24,30 gld.

Vidbendo: La reveno al Finnlando. O. Buller, R. Dobrzyński, J. Heikkinen. Dokumenta filmo pri la vizito de pola militkaptito al la loko de sia junaĝa tragedio. 1991. VHS-PAL. 25 min. 45,00 gld.

Kie kulturo kaj naturo kunas

Unu el la neforgeseblaj momentoj por mi kiel DX-aŭskultanto estis, antaŭ longe, kiam dum vagado sur mallongaj ondoj haltigis min grandioza prezento de la violonkonĉerto de Jean Sibelius. Montriĝis ke ĝi venis de Radio Tirano. Iel tiu surprizo parencas kun la trovo de finna ĉokolado en sudĉina hotelo dum ekskurso post la Pekina UK.

La apero de Kalevala en 1835 donis al la finnoj mem pruvon, necesan por la firmiĝo de ilia nacia sento, ke ili estas kultura popolo kun kapablo krei ion kion eĉ ne ĉiuj pli grandaj popoloj posedas — kaj Sibelius konsciigis pri tio la ceteran mondon. Lia *Finlandia* estas unu el la plej furoraj pecoj de klasika muziko, kaj *Trista valso* oni-dire la plej ofta melodio en kino.

Sibelius apartenis al nacia romantikismo, sed li ne ĉerpis el la popola muziko. Li ja inspiriĝis de la mitaj rakontoj de Kalevala kaj transformis ilin en simfoniajn poemojn senvortajn, sed tiuj mitoj en si mem estas universalaj. Lia muziko estas suome universala, iel same freŝa kaj pura kiel aero en finnaj arbaroj kaj akvo en ties riveretoj, se oni permesas tian naci-romantikan bildon.

Naturo estas en la sangode de la finnoj; ili preferas arbojn al urboj. Eĉ la nacia himno ne gloras la nacion sed prikantas la belecon de la lando, precipe ĝian someran pejzaĝon. Kaj ŝajne ne nur muziko sed la finna arto ĝenerale tiam distingiĝas per individueco kiam ĝi redonas trajtojn de tiu pejzaĝo. En ĝi mankas kruto kaj abrupto, ĝi iel ondumas kaj rondumas kiel la kreaĵoj de Alvar Aalto, la monde

plej renoma finna arkitekto, kaj kiel vitraj kaj aliaj dezajnaĵoj de Tapio Wirkkala kaj Timo Sarpaneva, aŭ teksaĵoj de Vuokko Nurmesniemi.

La trankvilon de la pejzaĝo tamen kontraŭpezas la kontrastoj de la klimato. Somere povas esti 30-grada varmego, sed pli oftas tioma frosto en vintro. Sendube ĝuste el tiu alternado de ekstremoj fontas io en la homa



Finnoj ne estas tiel sombraj kiel ilia plej konata filmreĝisoro, Aki Kaurismäki (maldekstre, en sia filmo *Mi dungis murdiston*).

naturo kio povas esprimiĝi en primitive nigra-blanka pensado, sed ankaŭ naski fortajn emociojn, kies artisme plej grandioza manifestiĝo estas la tragedio de Kullervo en Kalevala, la finna varianto de Hamleto.

La kontrastoj de la klimato des pli sentebles ju pli norden oni iras. En Laponio ne estas nokto somere, dum vintre ne estas vera tago. Kaj ŝajnas ke tio influis ankaŭ la homojn.

Dum en muziko kaj bildoartoj estas facile senti ĉhojn de la pejzaĝo, tiujn de la homa naturo oni trovas en literaturo. Ja ankaŭ tie la ĉeesto de la ekstera medio estas forta, kiel scias ankaŭ la esperantistoj konatiĝintaj kun Kalevala aŭ kun la unua vera romano finna, *Sep fratoj* de Aleksis Kivi. Ĉe la du finnaj Esperanto-poetoj Reino Eriksson kaj Aira Kankkunen

la ekstera kaj interna naturoj estas unu; ambaŭ sekvas la movojn de la homa animo per tiuj de vivaj kaj senvivaj objektoj de la naturo: birdoj, floroj, plantoj, ŝtonoj.

Por ekkoni la naturon de la finnoj *Sep fratoj* estas bona gvidilo. En ĝi la protagonistoj eskapas el la civilizo al izolita vivo en arbaro, ĝis ili fine revenas kaj adaptiĝas al la progreso. En tio estas io funde suoma: suspektemo al io fremda sed poste adaptiĝo kaj apliko. Tion mi ne trovas malprogresema, ĉar nur la fina rezulto gravas: ni pensu ekzemple ke la analfabeteco praktike malaperis jam fine de la pasinta jarcento. Ankaŭ la legopovon finnoj entuziasme aplikas: nur japanoj venkas ilin en statistikoj pri gazetlegado, kaj la romanoj de la plej populara

nuntempa verkisto Kalle Päätalo rapide vendiĝas en pli ol cent mil ekzempleroj.

Ĝis nun mi parolis ĉefe pri suomoj, la finnalingvaj finnoj. La svedlingvanoj ĉiam estis pli orientitaj eksteren kaj pli malfermaj. Ankaŭ la svedlingva literaturo diferencas disde la suoma: ĝi estas pli intelekta, pli urba, ekz. la poezio de Edith Södergran, kies volumon *Lando mal-ekzista* oni baldaŭ povos legi ankaŭ en Esperanto.

Finnoj tamen apenaŭ distingas ĉu iliaj verkistoj originale skribas finne aŭ svede. Johan Runeberg verkis svede, kio ne malhelpas ke li estas la nacia poeto por ĉiuj finnoj. Ni esperantistoj cetere havas kun li rektan ligon: lia nepo Nino — ankaŭ svedlingva poeto — estis la unua prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj membro de la unua Lingva Komitato.

Nia ekskurso tra la finna kulturo ne estu tiel mallonga ke ĝi preterlasu la kinon, kiu lastatempe iom famiĝis eksterlande dank' al ĉefe unu reĝisoro, Aki Kaurismäki. El liaj filmoj oni tamen ne faru tro rapidajn konkludojn pri finnoj: tiel tristaj kaj sombraj ili ne estas kiel ĉe Kaurismäki, ĉe kiu ĝis nun ŝajne neniun rideton oni registris.

Osmo Buller (Finnlando/Nederlando)

Ekslibrisa ekspozicio

Dum la UK ni ekspozicios ekslibrisojn kiujn e-istoj desegnis, aŭ kiujn artistoj kreis por e-istoj. Bv. sendi unu aŭ du el viaj ekslibrisoj al LKK (PL 338, FI-33101 Tampere), kun respondkuponon se vi volas rricevi ilin. Indiku la nomon de la posedanto kaj artisto, la presjaron kaj la presteknikon.

La afablaj arbaranoj

Kiel spertis eksterlandano, loĝinta kelkan tempon en Finnlando, la finnojn kaj ilian vivmanieron? Ni demandis pri tio la hispanon Georgo Kamaĉo, kiu vivis ĉirkaŭ unu jaron inter finnoj. Jen lia facilflua babilo, en iom redaktita formo.



En 1989-90 mi restis studocela naŭ monatojn en Oulu, 200-on da km-oj sude de la polusa cirklo. Ekde tiam — de kiam Sovetunio “ka-beis” — Finnujo

multe ŝanĝiĝis, sed mi kredas ke miaj impresoj pri finnoj restas validaj.

Eŭropeco kaj ekzotiko

Al vizitanto Finnlando supraĵe ŝajnas normala eŭropa lando, kun tramoj, kinejoj, policanoj, homoj kun kravatoj... Sed kiam vi konatiĝas kun la homoj, vi trovas ion kaŝan, preskaŭ ekzotikan, kio faras Finnlandon ege malsimila. La finnoj ne estas hind-eŭropa popolo, ili devenas el Azio.

La lando estas tre maldense loĝata. Ĉiu finno havas dometon en arbaro fore de la loĝurbo. Ili ligiĝas fortege al naturo, al arbaro kaj lagoj. En tiu senco mi konceptas ilin — arbaranoj.

Tamen, ili ne elstarigas sian apartecon. Ili tre volas integriĝi al Eŭropo, kaj jam multfadene ligiĝas al Skandinavio. Kompreneble, la finnoj havas multajn stereotipojn pri svedoj, pri rusoj — kaj inverse. Tio fontas el la historio: la finnoj formis onon de diversaj imperioj laŭlonge de la jarcentoj.

Ĉu tre malvarmaj?

Ili ne estas fermitaj homoj. Sed ilia lingvo tiel malsimilas ke ili devas venki multajn malfacilaĵojn por lerni fremdajn lingvojn. Pro tio ili estas timemaj. Krome, ili ne kutimas al korpa interkontakto: kiso tute ne estas kutima. Kio rezultas? Vi pensas ke ili estas tre malvarmaj. Sed se vi scipovas la lingvon, neniu problemo, malfermiĝas la pordoj. Ju pli bone vi parolas finne, des pli bone ili akceptas vin.

Kio por hispanoj estas trinkejo, por finnoj estas saŭno: kunven- kaj babil-

loko. Ŝipoj kaj lernejoj kaj ĉio havas saŭnon, eble ankaŭ la kongresejo. Do, mi iris foje al publika naĝejo, kaj sidiĝis en saŭno apud viroj. Ĉar mi aspektas tre malhispane (bluaj okuloj, hela haŭto), nenio denuncis mian devenon. Kiam mi ekparolis, ili demandis ĉu mi estas estono, ĉu miaj gepatroj estis finnoj, kial mi lernis la lingvon ktp. La finnoj kredegas sian lingvon la plej malfacila en la mondo — absurdaĵo! — kaj opinias ke neniu en la mondo interesiĝas pri ĝi.

Svedoj en Finnlando

La sveda lingvo estas kun-oficiala, lernata en lernejo, sed la komuna nacia lingvo estas la finna. Eŭropa turistoj kiu vidas la dulingvajn afiŝojn, rekonas kelkajn svedajn vortojn, sed ne la finnajn “barbaraĵojn”, kiel *puhelin* (telefono). Por mi estis inverse de la komenco, ĉar mi alvenis scipovante la finnan: la “barbara” lingvo estis la sveda... Do, mi ne multe konas la svedlingvan komunumon, eĉ se mi havis kontaktojn pere de esperantistoj.

Esperanto

Mi tre impresiĝis de la librotekoj publikaj. Nekredeble: en Oulu, urbo kun cent mil loĝantoj, ekzistas Esperanta fako kun sufiĉe multaj libroj. Tie Esperanto estas serioza afero; neniu priridas, neniu pensas ke vi estas la filo de Frankenstein ĉar vi lernis Esperanton.

Por ili la lingva problemo ne estas io fikcia! Tie mi neniam spertis kiel esperantisto tiajn dealtajn rigardojn malaprobajn kiajn oni povas trovi en aliaj landoj.

Kuirarto

La finna kuirado estas simpla, ne-komparebla al la baroka franca kuirarto. Simpla, sed nutra. Ili manĝas multe da kolbaso (*makkara*) kaj pano

(*leipä*). Mi konsilas bran-panon plej eble brunan, preskaŭ nigran, aŭ sekalan panon (*ruisleipä*). Mi ŝategis salmon, ekz. salman fornaĵon kun terpomoj (*lohilaatikko*). Sufiĉe nekutimaj por sudeŭropa palato, sed bonegaj estas la diversaj grenkaĉoj mikseblaj kun varmaj, dolĉaj supoj. La plej abomenindaj laŭ mi estas *maksalaatikko* (hepatfornaĵo, kiu enhavas rosinon kaj rizon) kaj *veriletut* (sangokrespoj). La finnoj kutimas trinki lakton kaj buterlakton (*piimä*) dum la manĝoj. La plej fama drinkaĵo estas la vodko Koskenkorva, krome bervinoj kaj berlikvoroj, ekz. *lakkalikööri* (likvoro el kamemoro, kiu estas marĉa bero simila al rubuso), kun kiu oni faras ankaŭ bombonojn. Plej drinkiĝas la biero Lapin Kulta (“La oro de Laponujo”).




Foto: Leipätoimikunta

Pano, ŝajne simplega nutraĵo, havas nenombrelajn specojn en Finnlando.

Kion nepras sperti?

Saŭnon mi ja rekomendas al ĉiuj — cetere, ili estas disseksaj, escepte de la familiaj saŭnoj kaj tiuj por plej proksimaj geamikoj. Indegas viziti la arbaron kaj la lagaron, eĉ naĝi nuda en lago... La akvo ne estas tro malvarma. Ĉirkaŭ la somera solstico nokto ne ekzistas. En la kongresa semajno oni ne vidos stelojn sur la ĉielo, ĉar la suno kaŝiĝos nur kelkajn horojn. Eble iuj havos malfacilon endormiĝi!

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Kiel verdigi dezerton?

Pasintjare Philippe Chavignon vizitis idojn de ĉefo Seattle ĉe la kanada-usona limo (jun. '94, p. 119). Poste li direktiĝis, kun Susan Rummerfield, al Kolombio tra Centra Ameriko, renkontante aliajn indiĝenajn kulturojn.

En Meksiko ni faris viziton nur, norde en Chihuahua, al mia nenova kaj ne-juna (93-jara) amiko Pedro Magaña — maja-devena pediatro, memoro de la landa movado, kiun mi intervjuis por la projekto "Vivprotokoloj" de Monda Kunagado — kaj, sude en Oaxaca, al la juna amiko Leandro García.

Pli sude komenciĝas unu el la bedaŭrindaj Esperantaj dezertoj — escepte de ĉefurbaj grupoj en Gvatemalo kaj Kostariko. Dum miaj antaŭaj vojaĝoj tra Centra Ameriko mi ja havis almenaŭ unu adreson en ĉiu lando, sed estis tiel malfacile eltrovi samideanojn ke mi ofte eĉ ne renkontis ilin. Tia estas la situacio en Belizo, Honduraso, Salvadoro kaj Panamo. Ankaŭ en Nikaragvo la embria grupo reduktiĝis al unu aktiva membro, Eddy Silva Molina (Sucursal Jorge Navarro, Ap. Postal 4314, Managua 5), juna studento, kies familio suferas pro manko de ĉio. Via helpo (gazetoj, libroj, salutkartoj, respondkuponoj) certe helpas firmigi lian esperantistecon.

En Kolombio, la ĉefa celo de la vojaĝo, ni restadis dum sep monatoj en taoisma komunumo, kies gvidanto favoras Esperanton kaj ebligis al mi instrui ĝin. Mi prelegis al centoj da sekvantoj kaj misiistoj antaŭ ol komenci Cseh-kurson. Pro la senĉesa iro kaj veno de vizitantoj kaj misiistoj, la kurson ĉeestis verŝajne pli ol 300 personoj, sed kiam mi adiaŭis ilin, ne pli ol 30 kapablaj paroli Esperanton: estis pluraj el Ekvadoro, Bolivio, Peruo kaj Venezuelo, eĉ unu el Nederlando.

En la ĉefurbo Bogoto mi prelegis antaŭ 80-kapa publiko kaj antaŭ ĉiuj klasoj de taoisma liceo. Mi vendis dekojn da kasedaj kursoj, kaj antaŭ mia foriro la tao-majstro konsentis aĉeti centon da ili, por ke la misiistoj propagandu Esperanton. Li ankaŭ invitis ĉiujn e-istojn. (Provizore kontakti min: 22 route de Blois, FR-41130 Selles sur Cher, Francio.) Mi lasis la plej talentajn lernantojn daŭrigi mian instruadon, kaj ni ekvojaĝis al Usono.

Survoje mi kontaktiĝis kun kostarikaj e-istoj, kaj prelegis en Gvatemalo ĉe Alliance Française (franca kultur-asocio) en Antigua kaj Gvatemal-urbo. La ĉefurba grupo intense agas ĉe la komunikiloj. Ĉiusemajna artikolo aperas pri Esperanto en nacia gazeto, televido intervjuas ... kaj ĉiusabate dunivela kurso okazas, de pluraj jaroj, ĉe Alliance Française.

Fine ni reatingis la amikon García en Oaxaca kaj vizitis la liceon kie li antaŭ kvin jaroj lernis Esperanton de hispana pastro, intertempe forlasinta Meksikon. La nova liceestro montriĝis tre favora al reenkonduko de Esperanto en 1995/96; necesas konfirmo de la licea administrantaro.


Konklude: kvankam mi prelegis en la pasintaj jaroj en ĉiuj landoj de Centra Ameriko, la semoj ŝajne ne ĝermis. Kial? Unu kialo estas manko

de taŭga instrumaterialo. Kiam mi prelegas france aŭ angle, mi disdonas senpagan korespondan lecionon, kiu havas ludajn aspekton kaj enhavon. Tio tiklas la scivolemon, kaj la senpageco instigas ekstudi. Tian materialon ĝis nun mi ne trovis en la hispana.

Alia kaŭzo estas ke mankas serioza kaj respondeca persono kiu kuraĝigus kaj prikonsilus la organizadon de loka movado, kunordigus la helpojn de UEA kaj de Esperantio — simile al la rolo de Hans Bakker en la afrika agado de UEA. Kie troviĝas tia homo? Aŭ tia klubo, tia organizo? Ĉu en Ameriko aŭ Hispanio? Ĉu eble en Usono kun ties 30 milionoj da hispanparolantoj, kie ELNA ŝajne elaboras hispanan korespondan kurson? Kie ajn — Centra Ameriko bezonas tian helpanton!

Philippe Chavignon (Francio)

Red.: En baldaŭa numero ni intervjuos la komisiiton de UEA pri amerika agado, Atilio Orellana Rojas, kies tasko estas plenumi la kunordigan rolon postulatan de Chavignon. Cetere, en la lasta UK elektis kvin-kapa komisiono por kunordigi la informfluon inter amerikaj landoj.



Kiel verdigi fekundejon?

En la movade vigla Brazilo: Cleber Albuquerque, Leda Gama, James Piton, Daniel Oliveira Santos kaj David Bianchini (de maldekstre) kunorganizis ekspozicion (23-25 nov.) en Campinas (ŝtato San-Paŭlo), en la biblioteko de la regiona labortribunalo, kiu mem informis cent juĝinstancojn en la ŝtato kaj la lokajn amas-komunikilojn. Tridek kvar vizitintoj lasis adresojn por aliĝi al korespondanta kurso, kaj disdoniĝis komputila lernoprogramo de Adonis Saliba. Por la nove starigita E-sekcio de la biblioteko bonvenas donacoj ĉe Leda Gama: C.P. 532, BR-13001-970 Campinas - SP. (Kultura Centro de E-o, Campinas)



Itala E-biblioteko nun publika

Reage al invito de Catina Dazzini, sesdeko da italaj e-istoj festis la 18-an de decembro la transdonon de la 6250-voluma biblioteko de Itala Esperanto-Federacio — biblioteko fondita de prezidinto de la asocio, Mario Dazzini

(1910-1985) — al la Ŝtata Arkivo en la urbo Massa, kie ĝi estos alirebla por la ĝenerala publiko. La prezidanto de UEA, John Wells, substrekiis en parolado la gravecon de materia bazo por la esperantlingva kulturo. Parolis

ankaŭ la verkistoj Paolo Alabani kaj Berlinghiero Buonarroti, kiuj utiligis la bibliotekon por sia ĵus eldonita “vortaro de inventitaj lingvoj”. De maldekstre: Catina Dazzini; John Wells; Michela Lipari, UEA-estrarano pri kulturo; Guido Carravieri, prezidanto de Itala Esperantista Junularo. (R. Corsetti, M. Lipari, *L'Esperanto*)

INSTRUADO

Usona rekordo

En 1994 la E-Kursaro de la San-Franciska Ŝtata Universitato atingis sian 25-an someron — kaj lastatempan rekordon de partopreno.

La fina adresaro de la jubilea kursaro (27 jun.-15 jul. 1994) listigas 77 nomojn — rekordo por la lastaj jaroj. Pli ol 50 estis oficialaj studentoj, aliaj 9 aliĝis al studgrupo unusemajna, kaj la ceteraj diversmaniere subtenis la okazigon de la kursoj. La plej fidela studento, Doris Vallon-Wheeler (kies poemo troviĝas en *Esperanta Antologio*), ĉeestis en ĉiuj 25 jaroj.

La unua profesoro estis William Auld, kiu instruis kelkajn sinsekvajn jarojn. En la unua jaro (1970) asistis lin tiama studento Duncan Charters, kiu poste multfoje gvidis la programon kiel profesoro. Li kunjubileis en 1994 kaj revenos en 1995, por estri la kursojn de la 26-a de junio ĝis la 14-a de julio. Kunprofesoros Spomenka Štimec (Kroatio) kaj Atilio Orellana Rojas (Argentino); konversaciajn grupojn gvidos Senjo Umeda (Japanio).

Jubilea jarfino en Japanio

Antaŭ 30 jaroj okazis la unua Transjara Kurskunveno de Junulara Fako kaj de Esperanto-Propaganda Asocio (EPA) de Oomoto. Dum la jubilea kunveno (30 decembro-2 januaro, Kameoka, Japanio), 70 homoj el 7 landoj ĝuis lernadon kaj amikiĝon.

Ekde kiam junulara karavano de Oomoto ĉeestis la Korean E-Kongreson en 1989, koreoj ĉiam partoprenis la kurskunvenon ĉe Oomoto — ĉi-jare ili venis 12-oje, akompanataj de LEE Jung-Kee, direktoro de Korea E-Asocio (KEA). Vizitis Oomoton ankaŭ prof. LEE Chong-Yeong, prezidanto de KEA, kiu restadas ĉe la universitato de Kôbe. [Kiel sciате, la regiono de Kôbe estis frapita de katastrofa tertremego la 17-an de januaro. Laŭ informoj ĝis la redaktotempo, neniuj esperantistoj mortis aŭ serioze vundiĝis. —Red.]

La lernantoj dividiĝis en 11 klasoj laŭ sia nivelo. Nova elemento ĉi-jare estis enkonduka kurso anglalingva por ne-japanoj. Reza Ĥejr-Ĥah (Irano/Japanio) prelegis pri Vjetnamio, prof. LEE pri “Esperantismo kaj homarantismo”, kaj MIAN Shany (Pakistanio)

pri la E-movado en sia lando. Ĉiu povis spekti Esperantan magion de DEGUCHI Kyotaro, prezidanto de EPA, aŭ sperti te-ceremonion kaj novjaran feston preĝejan de Oomoto.

EPA

Mazi venos en 1995



La kampanjo por la 180-minuta, internacie uzebla videbenda kurso *Mazi venos* (okt., p. 171) plene sukcesis: kolektiĝis pli ol 1100 antaŭmendoj el 31 landoj. La filmo do estos realigita en 1995. Ankoraŭ eblas ĝin mendi de Internacia E-Instituto (UEA-konto “iein-q”), nur ĝis la fino de majo, por 180 gld. + 18 gld. sendokostoj.

"La vojo", 13 fojojn

Post kiam niaj legantoj malkovris kvin muzikigojn por la Zamenhofa "La vojo" (jul.-aŭg., p. 130), kaj ni aperigis tiun ĵus komponitan de Jacques Filleul, pluaj leteroj pravas ke multaj jes ja komponis por ĝi muzikon.


"Iam post la morto en 1942 de la brita orgenisto Leonard Harding, esperantistoj aperigis presitan kantfolion kun lia muziko por "La vojo" — skribas Wilfrid Atkinson (13 Avon Close, Worcester Park, Surrey, KT4 7AQ Britio). Sed al li pli valora ŝajnas la porkorusa muzikaĵo de Frank Merrick (1886-1981; vd. pri li *Esperanto* marto 1993, p. 56), kiu nek eldoniĝis nek estis kantata dum la vivo de la komponisto. Atkinson posedas foto-kopion de la verko de Merrick.

Roger Colney (Francio) sendis al ni la komponaĵon de Louis Perret, mortinta e-isto el Liono — do, koincide samurbano de Jacques Filleul. Inter-tempe Filleul adaptis sian verkon por kvarvoĉa koruso kaj, rezignante pri

aŭtorrajtoj, proponas ĝin al esperantistaj ĥoroj. Tamen, laŭ muzikisto Sergio R. Docal (Usono) en la peco de Filleul (vd. jul.-aŭg.) "aperas du akcent-eraroj facile korekteblaj". Laŭ Docal, por ke la muziko kaj la teksto akordiĝu, necesas aŭ ŝanĝi la vortojn "al kiu kuraĝe ni iras" je "al kiu ni kuraĝe iras" kaj "al ni la direkton ĝi diras" je "al ni ĝi la direkton diras", aŭ fari el la unu ses-nota takto de Filleul du tri-notajn taktojn. Anstataŭ ĉi tio:



li do proponas ĉi tion:



Félix Navarro Clemente (Hispanio) sciigas ke lia varianta troviĝas en *Esperanta kanzonaro* (1993), cetere vendata en nia Libroservo (7,50 gld.). Eli Urbanová (Ĉeĥio) informas pri la komponaĵo de Ŝtefo Urban (1913-1974). Ŝajnas ke ankaŭ la bulgaro Jordan Kolev muzikigis la poemon en 1936. Finfine, ni malkovris ke UEA mem vendas du kromajn "La vojo": la unuvoĉan partituron, kun piana akompano, de Frieso Moolenaar (1881-1965) el Nederlando (0,60 gld.), kaj la tre individuan varianton de la itala Ĝanfranko Molle, sur la samtitola kasedo (1977; 21 gld.).

La Zamenhofa poemo inspiris do almenaŭ 13 komponistojn! Sed eble eĉ per tio ne finiĝas la longa kariero de "La vojo"...

Kontraŭ tri internaciaj respond-kuponoj ni povas sendi al interesiĝintaj legantoj la korusan pecon de J. Filleul aŭ/kaj la komponaĵon de L. Perret.

LINGVO

Ĉu meti aŭ ne meti?

Ĉu meti aŭ ne meti? Tiel staras la demando — almenaŭ kiam pri komoj temas.

Antaŭ kelka tempo ni ricevis jenan leteron de s-roj Ramón Manau Torres kaj Vicente Hernández Llusera el Katalunio (Hispanio):

Inter la membroj de nia Katalun-teritoria organizacio Kultura Asocio Esperantista, por kiuj ni ĉir- kuligas la UEA-organon, nestas la ĝenerala opinio, koincida kun la nia, ke la redakcio de la revuo *Esperanto* tute ignoras, ekde la lastaj jaroj, la Zamenhofan interpunkcion, jam longatempe imitatan de la plej gravaj instancoj de la Movado, kaj de ties plej eminentaj verkistoj kaj redaktoroj, ekde Kabe ĝis Kalocsay kaj Waringhien, en kies duonoficiala *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* troviĝas specifa apartaĵo pri la interpunkcio, el kiu ni eltiras jenan alineon, kies komo-aplikajn modelojn bedaŭrinde neniam atentis la redaktisto de *Esperanto*:

"Ankaŭ la rilatajn prop[ozici]ojn (enkondukitajn per rilativo) oni devas apartigi per komo: *li faris nenion el tio, kion li promesis; la virinon, kiu vin tiom interesas, mi vidis hodiaŭ sur la strato; min ĝenas la bruoj, kiun vi faras*" ktp.

Nia respondo: Ĉar la interpunkciaj kutimoj de niaj aŭtoroj estas tre mal-similaj, ni bezonas iom unueciigi iliajn tekstojn el tiu vidpunkto. La principojn por tio ni trovas, efektive, en PAG.

Tamen, en la kazo de subpropozicioj nia revuo ne sekvas la PAG-ajn konsilojn. Nome, laŭ nia opinio la komo de subpropozicio fakte estas "necese kaj sufiĉe" montrata de subjunktio (*ke, kiam, se...*) aŭ rilativo (*kiu, kio, kies...*); ne nepras komo por marki la inter-propozician limon.

Ni do ne uzas komon en ĉiuj PIV-e preskribitaj kazoj. Sed, por pli da klareco, ni ja povas uzi ĝin antaŭ subpropozicio, kiam tio igas frazon —

precipe longan — pli travidebla (kiel ĵus ĉi tiun frazon mem). Krome, ni povas uzi ĝin (kiel post ĉi tiu paren-tezo), kiam la subjunktio ne tuj sekvas la ĉefpropozician predikaton.

Aldone, ŝajnas inde gardi la "tradician" komon antaŭ *ne-determinaj* subpropozicioj, distinge de subpropozicioj *determinaj*, kiuj restu senkomaj. Jen ekzemploj el nia januara numero:


Ne-determina: "Oni povas bedaŭri ke Daniel Tarschys, kiu ... bone komprenas la lingvan problemaron, ne restis aktiva esperantisto" ("Vi trovos"). Ĉi tie la subpropozicio (SP) donas informon *kroman* ("ne-determinan") pri la subjekto de sia ĉefpropozicio (ĈP). La senco de la ĈP estas sendependa de la SP: "... Daniel Tarschys ... ne restis aktiva e-isto".

Determina: "La angla estas la fremda lingvo kiun mi plej bone parolas ..." (jan., p. 2). Ĉi tie la SP "kiun mi plej bone parolas ..." *determinas* la "fremdan lingvon" pri kiu temas. La ĈP ne havas la deziratan sencon sen la SP: "la angla estas la fremda lingvo" estas nekompleta mesaĝo. ★

Sur la spuroj de Nobel-premiitoj

En novembro (p. 182) ni anoncis ke la esperantisto Reinhard Selten ricevis ekonomikan Nobel-premion, kaj ni menciis aliajn premiitojn kiuj parolis aŭ subtenis Esperanton. Rezulte atingis nin pluraj interesaj leteroj pri "Nobelaĵoj".

Plej surprizis fakmesaĝo de Gunnar Gällmo (Svedio), laŭ kiu "la aserto ke esperantisto ricevis Nobel-premion pri ekonomiko estas erara". Nome, Nobel mem lanĉis nur kvin premiojn (pri fiziko, kemio, medicino, literaturo kaj paco) — tiun pri ekonomiko fondis kaj pagas la sveda nacia banko. Sekve, ĝi "nek nomiĝas nek estas Nobel-premio" laŭ Gällmo, malgraŭ ke ĝi "ja estas donata samtempe kaj samceremonie". Nu, se la ekonomika premio havas prestiĝon egalan kun tiu de la aliaj, kial kontesti ĝian "Nobelecon"?



Romain Rolland:
"Necesas ke en ĉiuj unuagradaj lernejoj de Eŭropo Esperanto estu instruata."

tuziasme pledis por Esperanto. En 1925 li prezidis la solenan malfermon de internacia konferenco en Parizo por uzado de Esperanto en scienco. Guillaume, membro de ties patrona komitato, ankaŭ estis en 1905 elektita ano de la unua Lingva Komitato. Tamen, ĉar liaj profesiaj okupoj malbligis al li lerni Esperanton, en 1910 li eksiĝis, sed restis firma apoganto de la lingvo.

Amoureux ankaŭ forstrekas unu nomon: "Wilhelm Ostwald (1853-1932) ne nur ne estis esperantisto, sed male, li kontraŭbatalis Esperanton."



La Nobel-pacpremiito Alfred Hermann Fried (1864-1921) verkis jam en 1903 E-lernolibron por germanoj.

Prof. Christer Kiselman (Svedio) sciigas pri "sekreta Esperanto-vizito de Nobel-premiito". Fakte, loka gazeto titolis tiel sian raporton pri la Upsala vizito de Reinhard Selten kaj lia edzino Elisabeth la 12-an de decembro, post la Nobel-ceremonio, por vespermanĝi kun sep lokaj esperantistoj.

Pliaj Nobel-premiitoj

Tazio Carlevaro (Svislando) aldonas esperantistan Nobel-premiiton al nia listeto: la farmakologo Daniel Bovet (1907-1992?), medicina premiito en 1957, estis frutempa "denaskulo", filo de la fama Ĝeneva esperantisto, psikologo kaj pedagogo Pierre Bovet.

Jean Amoureux (Francio) kompletigas la nomaron de *subtenantoj* per la franco Charles Richet (1850-1935) kaj la sviso Charles-Édouard Guillaume (1861-1938), medicino (1913) resp. fiziko (1920) premiitoj. Richet ĉiam en-


Vere: Ostwald ja prezidis la Delegacian Komitaton pri alprenado de helpa internacia lingvo, kiu adoptis Idon, kaj poste li donacis parton de sia Nobel-premio ĝuste por propagandi Idon.

Fine, *SAT-Amikaro* (jan. 1995) listigas nomojn de 26 (!) Nobel-premiitoj, el kiuj 14 ne estis menciitaj de ni. Laŭ ĝi "praktikis" Esperanton ankaŭ Salvatore Quasimodo (literaturo, 1959), "studis" ĝin Rabindranath Tagore kaj Halldór K. Laxness (literaturo, 1913, resp. 1955); "subtenis" ĝin William Ramsay (kemio, 1904), Bertha von Suttner, Henri Lafontaine, Fridtjof Nansen, Lord Edgar Cecil of Chelwood, Willy Brandt (paco, 1905, resp. 1913, 1922, 1937, 1971), Rudolf Eucken, Selma Lagerlöf, Romain Rolland, Roger Martin du Gard (literaturo, 1908, resp. 1909, 1915, 1937) kaj Alfred Kastler (fiziko, 1966).

Efektive, Isaj Dratwer plejparte kon-

firmas en sia *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* (1970, 1977) ke tiuj ĉi homoj subtenis Esperanton. Tamen, Dratwer atestas ke Lagerlöf nur "aprobis uzon de Esperanto por la literaturo kaj permesis eldoni ŝiajn verkojn en [ĝi]"; Martin du Gard favoris Esperanton nur buŝe de epizodulo en sia *La familio Thibault*; Tagore diris en 1926 ke li "tutkore simpatias" sed "ankoraŭ ne havis okazon detale pristudi" Esperanton.

Plej grave, nenio pravas la esperantistecon de Quasimodo: la fonto sur kiu Dratwer apogas sin (*Informilo de*



Albert Einstein:
"Mi neniam favoris Esperanton."

IEMW, majo 1964), tute ne mencias la italan poeton.

Fakte, nepras fari distingon. Unue, ni povas konstati ke kelkaj efektivaj parolantoj de Esperanto ricevis Nobel-premion: post revizio de nia novembra listeto ŝajnas ke temas "nur" pri Alfred Fried (paco, 1911), Daniel Bovet (medicino, 1957) kaj Reinhard Selten (ekonomiko, 1994). Due, ni scias ke iuj Nobel-premiitoj okaze esprimis simpatian al Esperanto. Ne indas atribui tro grandan gravecon al la favoro de ĉi tiuj, ja ilia apogo estis tre diversgrada kaj foje eĉ malkonstanta: ekz. Albert Einstein — kies ondiran subtenon al Esperanto eĉ modernaj E-informiloj ekspluatadas — en 1923 ankoraŭ akceptis la honor-prezidantecon de SAT-kongreso, sed en 1950 li respondis al letero de William Solzbacher "ke li ne favoras kaj neniam favoris Esperanton" (*Esperanto*, nov. 1977, p. 191). ★

“Ni, la popoloj” — unu mondo aŭ disaj eroj?

Je la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj, tutmondas diskutoj pri la plenumoj kaj la estonteco de UN. Ankaŭ nia kongreso en Tampere kontribuos al la jubilea debato. Mark Fettes ekondukas nin al la kompleksa temaro.

Ni, la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj, rezolutaj ...

Inter sango kaj larmoj naskiĝis la ideo.

... savi estontajn generaciojn de la plago de milito, kiu dufoje en la daŭro de unu homa vivo trudis al la homaro neeldireblajn suferojn ...

Aprilo 1945 — la eŭropaj-amerikaj venkintoj serĉis manieron masoni daŭran pacon en nestabila mondo. En San-Francisko, diplomatoj el kvindek landoj kunvenis por ekkonstrui novan internacian ordon, bazante ĝin sur idealoj pli ofte laŭdataj ol praktikataj. Oni ne celis revolucii la internaciajn rilatojn, nur meti ilin sur pli solidan bazon. En la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, do, kunrolis dekomence potenco kaj idealismo, praktikemo kaj principemo, bonaj intencoj kaj politikaj kalkuloj.

... rekonfirmi nian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj kaj de nacioj grandaj kaj malgrandaj ...

Unu fondoŝtono de la “unu mondo” de la aliancanoj estis la principo de ŝtata suvereneco, konfirmita en Artikolo 2 de la Ĉarto. Kion alian atendi, kiam la traktantoj pri la Ĉarto estis ĝuste la ŝtataj reprezentantoj? Sed dum ĝi rekonfirmis la ŝtatan potencon, la Ĉarto ankaŭ implice limigis ĝin. Ekde 1945, ĉiu ago de ŝtato, eĉ de la ŝtatoj plej potencaj, estas pritaksebla laŭ la principoj starigitaj en San-Francisko.

... krei kondiĉojn necesajn por la konservo de justeco kaj de respekto al la devoj rezultantaj el traktatoj kaj aliaj fontoj de internacia juro ...

La memfidaj okcidentaj ŝtatoj viziis pli vaste ol pri paco kaj justeco: ili kredis same firme je sia modelo de materia prospero. Ankoraŭ ne ombris la horizonton la ideo de ekologiaj limoj, kaj neniu konsideris serioze la ideojn de Gandhi, pri amasa bonfarto per ŝparema kaj spirite harmonia vivstilo.

... antaŭenigi socian progreson kaj pli altan vivnivelon en pli granda libereco ...

La “unu mondo” de UN konsistis do el prosperaj demokratiaj ŝtatoj, interkonsentintaj pri la bazaj valoroj de la homa vivo, uzantaj armforton nur por subigi ribelojn kaj diktatorojn, interligitaj per aro da traktatoj kaj aliaj juraj interkonsentoj. Kiel modeloj, kaj certagrade kiel kuratoroj, rolu la okcidentaj ŝtatoj, kaj ĉekape Usono.

semajno ni rigardos al la aktuala stato de la mondo, al la diversaj “muroj de miljaroj” ankoraŭ dividantaj la popolojn, kaj demandas kiel UN estus refarebla por efike dissaltigi ilin. Jen eta resumo de kelkaj el la defioj.

Ekologio: Kvankam ekzistas pli kaj pli da tutmondaj ekologiaj traktatoj, celantaj konservi la atmosferan ozonon, la marojn, la arbarojn, la bio-



Foto: UNICEF

Dum UN jubileas, plej bazaj rajtoj je deca vivo estas subfosataj en dekoj da landoj.

... decidis kunigi niajn klopodojn por realigi tiujn celojn.

Kaj jen la demando kiun ni frontos ĉi-jare: 50 jarojn post la ellaboro de la Ĉarto, kiom aktuala restas ĝia projekto por “unu mondo”? Evidente oni ankoraŭ ne atingis ĉiujn celojn de la Ĉarto — sed ĉu oni estas sur la bona vojo? Tre multaj influaj internaciistoj opinias ke jes. Laŭ ili, malgraŭ multaj problemoj kaj eĉ kelkaj antaŭvideblaj katastrofoj, la mondo tamen iĝas pli kaj pli unueca, pli kaj pli kapabla certigi decan vivon al ĉiuj siaj civitanoj — tute laŭ la antaŭvido de la Ĉarto-verkintoj.

Tiu aplomba tezo tamen meritas fundan esploron. Okaze de la 50-a datreveno de UN, internaciistoj tra la tuta mondo diskutas pri ĝiaj atingoj kaj malsukcesoj, pri ĝia potencialo kaj ĝiaj limoj. Jen la tasko ankaŭ de nia 80-a Universala Kongreso. Tra tuta

logian diversecon ktp, preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis la praktiko de la industriaj landoj, kiuj foruzas 80% de la ekspluatataj riĉfontoj de la mondo. Nun aro da novindustriaj landoj eksekvas la saman vojon. Ĉu ekzistas komunaj interesoj inter Nordo kaj Sudo, kiuj tamen ebligas bremsi la detruadon?

Ekonomio: Kvankam altiĝas la averaĝa salajro en aro da landoj, la nova prospero malegale distribuiĝas inter urbo kaj kamparo, naciplimultoj kaj malplimultoj, grandaj firmaoj kaj simplaj laboristoj. En aro da aliaj landoj la ŝuldoŝarĝo plu erozias ĉiujn esperojn. Eĉ okcidentaj registaroj ne plu kapablas bridi la korporaciojn kaj spekulaciantojn kiuj internacie transendas mil miliardojn da dolaroj ĉiutage por ĉasi tujan profiton anstataŭ investi en longdaŭraj projektoj. Ĉu neeviteble plu kreskos la diferencoj inter landoj kaj inter socitavoloj?

Homaj rajtoj: Malgraŭ mirinda progreso sur tiu ĉi kampo post la fondo de UN, la universaleco de la homaj rajtoj estas ankoraŭ pli espero ol realo. Stabila demokratio kun funkcia, sendependa jura sistemo ne estas hodiaŭ ege pli multnombraj ol en 1945. Plej brutalaj amaskrimoj estas farataj de diversaj membroj de UN, kiel atestas la loĝantoj de Orienta Timoro, Tibeto, kaj la landlimaj provincoj de Birmo. Kaj plej bazaj rajtoj je deca vivo estas subfosataj en dekoj da landoj pro monda ekonomia sistemo kiu starigas sklavajn labor- kaj loĝkondiĉojn. Ĉu plu akcepti esceptojn, aŭ riski forpeli landojn el la rondo de UN?

Paco kaj sekureco: Ja malaperis la granda dupolusa disdivido, kiu minacis la tutan terglobon per nuklea vintro. Sed restas nukleaj armiloj — malrapide disvastiĝantaj al la plej nefidindaj registaroj —, kaj eksplodis aro da novaj (aŭ malnovaj) konfliktoj. La Sekureca Konsilio de UN montris sin senpova en Somalio, malrapidega en Ruando, kaj baraktanta en Bosnio. Pro timoj pri sia suvereneco, la ŝtatoj ne permesas antaŭkrikan esploradon aŭ intervenon de UN. Ĉu eblas difini universalan rolon por la “blukaskuloj”, en mondo kun tiom da mal-samaj malpacoj?

Sur la *lingva* kampo, kompreneble, ni ne multe hezitos pri la sekvinda direkto de UN-reformo. La rilatoj inter Esperanto kaj UN estos temo por apartaj diskutoj. La kongreso vidos ankaŭ la lanĉon de nova, unika kompilaĵo, prizorgata de eks-ambasadoro Ralph Harry: kolekto de kelkaj el la plej gravaj interkonsentoj aŭspiciitaj de UN, ekde la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĝis la Ĉarto por la Tero. Gejunuloj kunvenos dum la kongreso en Modela UN-Asembleo.

Ni alportos unikan perspektivon al tutmonda debato — tiun de transnacia komunumo, kiu efike solvis almenaŭ unu el la multoblaj defioj de la 20-a jarcento. Per cent ok jaroj da sperto pri personaj, senperaj, internaciaj rilatoj, ni perlaboris konsil-rajton. Ankaŭ nia sorto en la 21-a jarcento, same kiel de multaj aliaj ideoj entreprenoj, estos firme ligita al la sorto de Unuiĝintaj Nacioj — al ĝia kapablo aŭ malkapablo, sukceso aŭ malsukceso, garantii vivindan estontecon.

Mark Fettes
Ĝenerala sekretario de UEA
Estrarano pri eksteraj rilatoj

“UN-sembleo” por gejunuloj

La 50-a jubileo de Unuiĝintaj Nacioj estas ankaŭ “Jaro de Toleremo”. Jen kial ŝajnas duoble trafe okazigi modelan UN-sembleon kadre de la UK en Tampere.

Unu el la celoj de UN estas “stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.” Jen rilato al Esperanto — persekutita lingvo —, kaj jen taŭga temo por nia modela asembleo: la pozicio de minoritatoj ene de nacioj.

Multloke oni jam okazigas ludajn UN-modelojn — tamen, uzante nur la anglan lingvon (malkiel la vera UN). Por realigi similan asembleon pere de la celita dua lingvo de la homaro, mi ŝatus trovi po 2-4 reprezentantojn el kvindeko da landoj, prefere 16-26-jarajn, kiuj venos al Tampere. Necesas ke ili konduku kiel la veraj delegitoj ĉe UN-sembleo (aŭ eĉ pli bone!), ke ili sufiĉe konu la temon traktotan kaj la starpunkton de sia registaro.

Oni devas do serioze prepari sin — sed la evento estos kaj eduka kaj ĝuinda.

La tuttaga kunsido de nia asembleo okazos la 26-an de julio, dum la ekskursita tago. La sesion malfermos reprezentanto de nordia UN-asocio; poste prezentos sin ĉiuj delegitoj. Inter la diskutoj paŭzoj ebligis privatan debaton. Fine oni voĉdonos pri rezolucio koncerne minoritatojn.

Mi jam ricevis reagojn el i.a. Finnlando, Irlando, Kostariko, Kroatio, Madagaskaro kaj Usono — fakte multaj landoj, sed ne sufiĉaj. Kontakto do:

Geoffrey Greatrex
 39 William Street
 Oxford, OX1 3DP, Britio
 fakso: +44/1865/279-630
 e-poŝto: greatrex@ox.vax.ac.uk
 aŭ greatrex@vax.ox.ac.uk

TEJO sur la eŭropa scenejo

Dank’ al i.a. Anna Ritamäki, TEJO lastatempe altigis sian prestiĝon inter la junularaj organizoj agantaj je eŭropa nivelo.

TEJO ĵus unuafoje partoprenis (11-13 nov., Helsinko) kunsidon de la Junulara Forumo (JF) de Eŭropa Unio, al kiu ĝi aliĝos se ties printempa Ĝenerala Asembleo voĉdonos favore. JF estas kunlaborejo de internaciaj junularaj organizoj kaj de naciaj junularaj konsilioj, precipe rilate al eŭrop-uniaj aferoj — sed ĝi havas ligojn kun kaj projektoj en tuta Eŭropo kaj eĉ aliaj mondopartoj. Tial nia tutmonda TEJO povus multe profiti el membreco.

Sur la eŭropa scenejo agas krom JF la Eŭropa Kunordiga Buroo (EKB) de Internaciaj Junularaj Organizoj kaj CENYC (Konsilio de Eŭropaj Naciaj Junularaj Komitatoj). Ili ĉiuj nun tut-eŭropiĝas kaj interproksimiĝas. Ni membras en EKB, al kiu ni povas danki precipe niajn kontaktojn kun Konsilio de Eŭropo (KdE). Mi de du jaroj

reprezentas TEJO-n en EKB. Dum la lasta EKB-kunsido (2-4 dec., Dublino) mi elektiĝis en la 24-kan Konsultanta Komitato de la Junulara Fakto de KdE, kiu estas konsultata ĉe decidoj pri junularaj aferoj. Tio signifas por ni: pli da informoj, kontaktoj, utilaj spertoj — kaj influ-povon al la sorto de niaj subvenci-petoj pri seminarioj.

La kontraŭrasisma kampanjo “Ĉiu malsama — ĉiu egala” de KdE daŭros tra la tuta 1995. Mi rekomendas ke e-istaj organizoj — ne nur junularaj! — partoprenu. Montru interesiĝon al la organizantaj naciaj komitatoj, kies adreson vi povas ricevi de mi:


Anna Ritamäki
 55 Harcourt Rd
 Sheffield, S10 1DH Britio
 tel.: +44/742/679-154; faks. 661-382;
 e-poŝto: a.ritamaki@sheffield.ac.uk

La malplimulto de Eŭropo: TEJO/KER-seminario



Budapeŝto, 29 aprilo - 7 majo. Aliĝu (prefere eŭropanoj sub 30 jaroj) antaŭ la 31-a de marto ĉe Nóra Csizsár, Erdődy Pálffy Tamás u. 25, HU-8100 Várpalota, Hungario (tel.: +36/1/251-29-02).

Recenzoj



Kompreninda novelaro

Kompreni. Gonçalo Neves (1964). Berkeley: Bero, 1993. 55p. 21cm. 10,80 gld.

Jennaŭ rakontoj, tre malsamaj laŭ speco kaj, do, lingvaĵo. *Vivaĉo* priskribas bildige, sentige kaj eĉ flarige, per densega lingvaĵo, la urbegan trafikon en prem-horo. Poste, iom abrupte, ĝi turniĝas en rakonton pri viro kiu volas, eĉ se nur unufoje, eskapi el la tutviva rutino. En *Ekskurso*, spacveturantoj trovas sur pereigita planedo tekston en nekonata lingvo. *Inter gonoraloj* estas kontraŭ-militista dialogo inter militistoj, inspirita de Auld. Plie vi trovos cinikan satiron pri la komenco de la Gofa milito; trafan satiran skeĉon pri sciencista kun-veno; surprize modernigitan version de “korvo kaj vulpo”; plursignife sukan

rakonton pri Zeŭso, kiu intencas krei homon (kaj pri la atendeblaj konsekvencoj por li mem); prozajn poemojn pri ŝipanaro sur bordo de lando amazona (laŭ Auld) kaj pri unua am-avento de liceano.

Aldoniĝas aŭtoraj komentoj ne nur pri la rakontoj, sed ankaŭ pri la malsama akcepto kiun la manuskripto renkontis ĉe diversaj eldonejoj.

Neves uzas Esperanton bildige kaj vivece, foje efektecte, laŭ ĝiaj propra strukturo kaj interna dinamiko. Li do ne apartenas al tiuj famuloj kiuj fakte neniam alproprigis la lingvon kaj tial mem inventas ĉiuspecajn

aferojn. (Li eĉ satiras pri ties kvazaŭ-Esperanto.) Li ne aŭtomate preferas unuradikaĵojn, sed ekspluatas ankaŭ la vortkonstruajn kapablojn de Esperanto. Tamen la stilo de Neves ja necesigas multajn radikojn ne ĉiutage renkontatajn — kvankam ĉiam PIV-ajn. La t.n. literaturajn sinonimojn (PIV-ajn facile anstataŭigeblajn per pli kutima vorto) li pli ŝpareme uzas en la malpli poeziecaj tekstoj. Sekvinda ekzemplo! La akuzativo aperas amase, en ĉiuj siaj roloj (ankaŭ post adjektivoj kaj adverboj). La senco de liaj *-ut-* kaj *-unt-* estas evidenta por tiuj kiuj sentas la signifon de verbo-sufiksoj. Li tamen evitas *-ant-*, fid(ant)e la agan forton de la verbo-radikoj; ne ĉiam prave.

Ĉi tiun libreton aĉetu ĉefe se vi havas PIV kaj se vi regas la akuzativon! Alie, ĝuu la rakontojn — eble post iom da deĉifrado. Kaj legu ilin por viviĝi PIV-vortojn, por decidi ĉu kaj kiam vi mem uzos tiujn. Kaj *kiom* vi uzos... por eviti la sorton de la lingvo en *Ekskurso*.

Wouter F. Pilger (Nederlando)

Pledo por la rajto je alieco

Silka kuseno. Johan H. Rosbach (1921). Hyvinkää: Mendoservo, 1991. 64p. 20cm. 18,30 gld.

Unumane. Johan H. Rosbach. Oslo: Esperantoforlaget, 1991. 126p. 21cm. 26,10 gld.

Kovrila foto de *Unumane*: Helga B. Rosbach



Unumane: la sola originala romano en 1991

Foliumante la verkojn de Rosbach, ni ne kunpuŝigas kun esceptaj temoj kaj vortumoj; male, lia prozo ĉerpas el la

fontoj de ĉiutageco, el la problemoj de “malgranda” homo.

La dek ok etaj rakontoj de la no-

velaro *Silka kuseno* similas al nostalgijaj rememoroj. Karakterize, priskriboj dominas super agoj kaj okazaĵoj. Ne la intrigo profilas la stilon de Rosbach, sed la medita etoso, tra kiu li gvidas la leganton al ĉiamaj demandoj aŭ rekte al konkludoj, tamen sen trudema edifo, ofte kun humura tono.

La romano *Unumane* daŭrigas kaj disvolvas la samajn trajtojn en la temaro kaj proponas formon iom nekutiman por la ĝenro. La unuaj kvar el ĝiaj kvin partoj dediĉitas al kvar personoj, junuloj el malsamaj landoj, kiuj pro hazardo de la destino renkontiĝas. En la fino kunestas tragedio kaj feliĉa fino, pruvante ke malgraŭ ĉio la vivo daŭras. Ĉiu protagonisto portas sian handikapon, socian, psikan aŭ fizikan, kaj strebas solvi la problemon de sia vivo. La ĉefa premo venas de la socio, kiu altrudas sian falsan moralon.

Al la ulceroj de la socio kaj la purgatorio de la propra konscienco Rosbach direktas sian rigardon plenan je humanismo. La plej aprobindaj trajtoj de lia verkaro estas la estimo al la homo, malgraŭ ties malperfektaĵoj, kaj la mallaŭta pledo por respekto al la aparteco de la individuoj, por la rajto je alieco.

Aleksandar Šivarov (Bulgario)

Daŭre flugu tiaj Kajtoj

Procesio multkolora kaj Tohuvabohuo. Kajto. Drachten: Flugdrako, 1991/1992, resp. 1993. Ambaŭ 25,80 gld. (kompakta disko) resp. 19,50 gld. (kasedo).

Institucio en Esperantujo ĝi jam fariĝis, la muzikgrupo Kajto, kaj prave. Jam de jaroj tiuj muzikistoj — renomaj kaj sukcesaj ankaŭ nacilingve — konsistigas per siaj koncertoj, kasedoj kaj diskoj konsiderindan parton de la Esperanta muzika kulturo. Regule aperante en la movado, ili same regule aperigas sonile siajn verkojn. En 1989 eldoniĝis la inicaĵo *Kajto*, en 1991 *Procesio multkolora* kaj en 1993 *Tohuvabohuo*.

Eble la sekreto de la Kajta sukceso kuŝas en tio ke la muzikistoj ĉerpas el diversaj stiloj, regionoj kaj epokoj, trafe adaptante la konvenan muziktipon al la bezonoj de la tekstoj, tamen kreante propran, tuj identigeblan tonon, egale ĉu la trajto de la peco estas folkloreca (laŭ diversaj regionoj), artisma, danca (vals, poloneza, latin-amerika ktp), sentimentala, pure voĉa, mezepoka/renesanca, ĵaza — nur por doni superrigardon pri la vasta, kompetenta komponarto de Nanne

Kalma, kiu ankaŭ mem kantas kaj ludas plurajn kordinstrumentojn. La virina flanko kun Marita Kruijswijk, Ankie van der Meer kaj Marian Nesse estas same talenta kun sia klara, preciza kantado kaj lertega manipulado de diversaj instrumentoj kiel bekfluto, ŝalmo aŭ akordiono. Aldona frandaĵo, tiom rara en la populara muziko nuntempa: plurloka utiligado de polifonio, ravaj kanonoj kun sorĉa efiko — preskaŭ obsedo (bonvenega!) de la grupo.

La unua parto de *Procesio multkolora* estas vera ciklo, lokita en pupoludista medio, almenaŭ laŭ la tekstoj de N. Kalma. La pli diversaj tekstoj de la dua parto devenas de pluraj aliaj E-poetoj. La plej nova *Tohuvabohuo* estas enhance ne tiom kohera kiel la

antaŭa kolekto — tamen ne pelmela, kiel eble sugestas la titolo. Ĝi entenas cikleton, nome “Eŭropo-Trilogio”. Muzike ĝi estas eĉ pli riĉa ol la antaŭaj, kun impresaj gastmuzikantoj kiel la societo De Woudklank kaj (certe ekster-Esperantia) ĥoro kun membroj inter 11- kaj 78-jaraj.

Ambaŭ titoloj estas haveblaj kiel kasedo aŭ kompakta disko. Ampleksa libreto enhavas la tekstojn en Esperanto kaj koncizigojn en dek lingvoj.

La teknika flanko, la sonkvalito estas senriproĉaj.



Tohuvabohuo de Kajto estis inter la plej furoraj kulturvaroj de 1994.

Longe ŝvebu tiaj kajtoj, tiaj Kajtaĵoj super Esperantujo, kun ĉiam novaj facetoj! Pri la muzika kvalito, pri la emocia ĝuo vi certe ne dubos.

Franz-Georg Rössler (Germanio)

Ĉuoj kaj ĝuoj

Por vidi la mondon. Anjo Amika. Budapeŝt: Kadencia, 1992. Kasedo 41-minuta. 24,00 gld.

Laŭ lula ondo. Nikolin'. LF-koop, 1990. Kasedo 33-minuta. 27,00 gld.

Ĉu vi ŝatas nur ĝisoste verdajn kantojn? Se jes, lasu vian ŝparporketon en paco. La kasedo de Anjo Amika ne plaĉus al vi. Ja, diference de la aŭtentikaj krokodilkoloraĵoj, la ĉikasedaj kantoj estas variaj, senchavaj kaj profesie prezentitaj.

Ĉu vi tamen bezonas ankoraŭajn informojn? Jen ili. Rok-muzikaĵoj, ve aŭ malve, forestas. La humoro de la kantoj estas jen bubece petola (kiel en la itala “Kvankam ni virinas”), jen profunde lirika aŭ drameca (kiel en “Ino de l’ am”) aŭ “Genu”). Kio restas konstanta, estas la plaĉa voĉo de Anjo, kiu vere amikigas la aŭskultantojn kaj tiel absolute pravigas sian pseŭdonomon.

Ĉu vi havas aliajn ĉuojn? Lasu. Ĝui estas multe pli interese ol ĉui. La kasedo ebligas tion al vi.

Pardonu min, Nikolin'. Mi ne povas kapabligi la paperon soni. Tiel milde, amece, pacige, kiel en “Serena lulkanto” (Tarallo-Silfer). Tiel ke vi sentu vin ene de kvieto, trankvilo kaj kareso. Tiel ke vi aŭdu la teneron de la Gershwin-a “Somertemp” (tr. Martinelli) kaj la simplon de la israela kaj karelia popolaj kantoj. Tiel ke ekvibru en vi la sentoj de “Vjetnama patrino” (Molle-Masao) kaj “Siberia lulkanto” (Dinnyés-Baghy).

Ne, mi ne povas magii tion. Pardonu min, Nikolin'. Mi ne kapablas lulondumi kiel vi!

Recenzo-fuŝule

Aleksandr Melnikov (Rusio)


La franca sorĉkastelo

Lastan someron mi festis en Kastelo Grésillon la 30-an datrevenon de mia edziĝo kun franca instruistino, kiun mi renkontis tie. Kunfestis 50 samideanoj el 8 landoj, inter ili brita geedza paro, kiu post multaj jaroj da movada laborego ne plu kredis al sukcesa estonteco de nia movado. Post kelkaj tagoj en Grésillon, ili diris: “Jen la vera Esperantujo!”

Grésillon, en la turisma regiono Luar-valo, estas taŭga celo ankaŭ por korespond-kursanoj, kiuj povas renkonti homojn kun simila lingvonivelo kaj partopreni progresigan kurson. [Vd. programon sur la dorskovrilo.]

Les Hartridge (Britio)

Laste aperis



ABC de Esperanto. Berkeley: Bero, 1994. 14p. ISBN 1-882251-08-3. 21cm. Bazaj faktoj pri Esperanto en la rumana. 2,10 gld.

Ali, la simbolo de humaneco. S. Morteza Mirbaqian. Tehran: Atai, 1994. 50p. 21cm. Rakontetoj el la vivo de imamo Ali. 10,50 gld.

Antaŭ la kulisoj. Unuaktaj teatraĵoj. Bernard Golden (1925). Budapest: Hungara E-Asocio, 1994. 187p. ISBN 963 571 452 1. 21cm. Tri tragikomedioj, tri krim-fikciaĵoj, du komedioj kaj kvar Esperantujaĵ fantaziaĵoj. 18,00 gld.

Arsène Lupin — Konfidencoj. Maurice Leblanc (1864-1941). El la franca trad. Hervé Gonin. Paris: UFE, 1994. 60p. ISSN 0775-7698. 21cm. Tri historioj pri fama "gentlemano-ŝtelisto". 11,40 gld.

Bildungskybernetik und europäische Kommunikation. Red. M. Krause, S. Piotrowski. Dobřichovice: Akademia Libroservo, 1994. 202p. ISBN 80-85853-00-0. 20cm. 25 referaĵoj de la simpozio "Klerigkibernetiko kaj eŭropa komunikado" (1993), kun resumo en Esperanto. 29,70 gld.

Brazila antologio poezia. El la portugala trad. Francisco Valdomiro Lorenz (1872-1957). Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1994. 452p. 21cm. 324 poeziaĵoj de 120 brazilaj poetoj, de la 17-a ĝis la 20-a jc. 32,10 gld.

Ĉina ceramiko. Zhao Hongsheng. El la ĉina trad. Wang Chongfang. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 223+15p. ISBN 7-5022-0087-9. 19cm. Fotoj. Historio kaj nuntempo de la famaj porcelano kaj aliaj ceramikaĵoj de Ĉinio. 12,00 gld.


De duopo al kvaropo. Gerrit Berveling (1944). Breda: VoKo, 1995. 80p. 21cm. Sekvo de la aŭtobiografia *La unuaj 25 jaroj en mia memoro* (vd. okt., p. 175): la vivo de nederlanda ekesperantisto en 1969-1975. 10,80 gld.

Ĉu vi jam rekotizis por 1995?

Se ne, tiu ĉi estas la lasta numero de nia revuo kiun vi ankoraŭ ricevas!

Enciklopedieto de Ĉinio. Komp. Li Qiang, Zhang Meizhi. El la ĉina trad. Fan Yizhu. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 305+15p. ISBN 7-5052-0086-0. 20cm. Fotoj. Detala konsultlibro pri la geografio, historio kaj kulturo de Ĉinio. 19,50 gld.

Esperanto-Dschungelbuch, Das. Kleiner Führer durch den Esperanto-Dschungel von Abkürzungen und Begriffen. Jürgen Wulff (1963). Hamburg: la aŭtoro, 1994 (2-a eld.). 22p. 21cm. Klarigo de vortoj kaj de ĉ. 150 mallongigoj el la E-kulturo. 4,80 gld.



Du freŝaj volumoj pri preskaŭ ĉio kion vi iam ajn volis scii pri Ĉinio

Estonio en koloroj. Margit Raud. El la estona trad. Kaljo Pill. Tallinn: Perioodika, 1994. 52p. ISBN 5-7979-0523-X. 18x22cm. Kolorfota albumo. 15,00 gld.

Hej, amikoj! TABUTI Yasuo (1951). Tôkyô: IKL, 1993. 78p. 26cm. Lernolibro por japanaj komencantoj. 12,00 gld.

Historio pri la skismo en la laborista Esperanto-movado (1935). Platiel. Beauville: SAT, 1994. 20p. 21cm. Senŝanĝa represo. 2,10 gld.


Idealo kaj realo de internacia lingvo. La (1922). Hujucz (1896-1986). El la ĉina trad. Chen Yuan. Tehran: Atai, 1992. 31p. 17cm. Dulingva: E-persa. 5,40 gld.

Internacia vortaro de mikroba genetiko. Komp. Ralph A. Lewin (1921). Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 117p. ISBN 7-5052-0184-0. 19cm. Terminoj de mikroba genetiko kaj molekula biologio. Anglaj ekvivalentoj, difinoj en Esperanto kaj en la ĉina. 21,60 gld.

Jura vortaro. Esperante-ruse-ukraine-angle. V.T. Horbačuk, F.I. Poddubnij, L.I. Tuhvatullina, G.M. Ŝilo. Slavjansk': Akademia Centro, 1994. 402p. 22cm. Bind. 2587 terminoj de administra, aŭtoro, civila, diplomatia, familia, financa, hereda, kriminala, labora, mara, milita kaj patenta juro. Laŭ la E-alfabeto, kun indeksoj en la aliaj lingvoj. 59,70 gld.

Language as barrier and bridge. Editoris K.E. Miller, H. Tonkin. New York/Rotterdam: Univ. Press of America/CED, 1992. 16+125p. ISBN 0-8191-8670-8. 23cm. Bind. 14 kontribuoj al konferencoj de CED kaj la Traduka Fakto de UN, pri lingvouzo en internaciaj organizoj k. a. temoj. 42,00 gld.

Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion (1976). Helmar Frank (1933). Dobřichovice: Akademia Libroservo, 1994. 190p. ISBN 80-901335-9-2. 20cm. Dulingva (germana-E). Pionira teksto en Esperanto pri la temo. 12,00 gld.



Mondcivitanoj. Tutmonda civila stato: 1-a tutmonda institucio. El la franca trad. Jacqueline Lépeix. Beauville: SAT, 1994. 14p. 21cm. Pri la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj. 2,10 gld.

Mondiaal. Ton Verwoerd (1930). Heemskerk: la aŭtoro, 1994. 36+16p. 30cm. Nederlandlingva E-lernilo por infanoj. Kun kasedo kaj kajero por la instruanto. 26,10 gld.

Morto de sciencisto. Ronald Cecil Gates. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1994. 83p. ISBN 90-71205-55-X. 21cm. Nova murdenketo de komisaro Roberto Elis. 12,30 gld.

Neforgesebla tago, La. Notoj de la atom-bombitaj virinoj el Hiroŝima kaj Nagasaki. Red. Mijuki Kamezaŭa. El la japana. Nagoja: Grupo por diskonigi tra la mondo "La neforgesebla tago", 1993. 116p. 26cm. 26,10 gld.

Periodaĵoj. Red. Árpád Máthé k.a. Budapest: Rondo Takács, 1994. 88p. ISSN 1216-

**Posedantoj de
GRAMATIKO DE ESPERANTO
(de BAK GIŬAN, 1994, Seulo)!**

Bonvole skribu al la tradukinto S-ino Kim Uson (406-203 Chugong Apt., 234 Bon-2-dong, Tobong-ku Seoul 132-062, Koreio) por la KOREKTO de la libro. La eldonisto elkore pardonpetas pro la misprespo.

7800. 30cm. Ringe bind. Jarkolektoj 1993-1994 de bibliografia organo. Kun donitaĵoj pri ĉ. 10 mil periodaĵoj en aŭ pri Esperanto. 36,00 gld.

Plezuro disiĝi, La kaj La geedza pano (1897). Jules Renard (1864-1910). El la franca trad. Arno Lagrange, Hervé Gonin. Paris: UFE, 1994. 40p. 21cm. Du unuaktaĵoj; la unua ludita de Teatro Krizalido en 1986-88. 10,80 gld.

Quốc t̃ng ngữ Esperanto. Ngô Chân Lý. Hồ Chí Minh: Nhà Xuất Bản Giáo Dục, 1994. 79p. 21cm. Lernilo por vjetnamoj. 6,00 gld.

Rakonto de kampara bubo. Bruno Najbaro (1923). Riga: Latvian E-Asocio, 1994. 116p. 20cm. Aŭtobiografio de latv-origina brita esperantisto. 16,50 gld.

Refoje krimnoveloj sep. Ronald Cecil Gates. Matraville: Aŭstralia E-Asocio, 1994. 90p. ISBN 0 646 18549 7. 21cm. Tria volumo de aŭstralia krimrakontisto. 12,90 gld.

Reĝo de l' eonoj. Mile Prpa (1944). El la kroata trad. Lucija Borčić. Zagreb: la aŭtoro, 1993. 52p. 21cm. Bind. 14 mallongaj poemoj. Trilingva: kroata-itala-E. 12,00 gld.

Sanfavo vivmaniero. Komp. Kiril P. Popov. Sofio: Pres-Esperanto, 1991. 76p. 21cm. 26 artikoloj kaj prelegoj pri sanprikzorgo. 5,40 gld.

Verso il fonetismo. Evoluzione della scrittura. Amerigo Iannaccone (1950). Venafro: EVA, 1994. 45p. 21cm. Studo pri la evoluo de skribsistemoj kaj de ortografio, i.a. tiu de Esperanto. 13,50 gld.

DIVERSAĴOJ

Bildpoŝtkartoj. Pentris Usui Hiroyuki. Tokio: Libroteko Tokio, 1994. 5 kolorriĉaj pentraĵoj. 9,00 gld.

Kasedo: Ne donu tro. Ĵak Le Puil (1940). Thaumiers: la aŭtoro, 1994. 40 min. Naŭ kantoj, originalaj kaj tradukitaj, kun teksto-folio. 9,30 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en la Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

**NOVE PERATA DE
LA LIBROSERVO DE UEA**

Litova Stelo (organo de Litova E-Ligo), 20 gld. por 6 numeroj.

KOTIZTABELO DE UEA POR 1995

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Aŭstralio/dolaro	12	30	75	45	30	150
Aŭstrio/ŝilingo	100	245	610	365	245	1220
Belgio/franko	290	720	1800	1145	765	3600
Brazilo/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Britio/pundo	6	14	35	22	15	70
Bulgario/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Ĉeĥio/krono	125	310	775	465	310	1550
Danlando/krono	55	140	350	225	150	700
Finnlando/marko	45	115	290	175	115	580
Francio/franko	50	120	300	190	125	600
Germanio/marko	14	35	87	55	37	174
Greklando/drakmo	1400	3400	8500	5400	3600	17000
Hispanio/peseto	800	2000	5000	3200	2100	10000
Hungario/forinto	500	1200	3000	1800	1200	6000
Irlando/pundo	5	13	33	21	14	66
Islando/ <i>guldeno</i>	16	39	97	58	39	194
Israelo/ <i>guldeno</i>	13	32	80	48	32	160
Italio/liro	11000	28000	70000	45000	30000	140000
Japanio/eno	1150	2880	7200	4320	2880	14400
Kanado/dolaro	12	29	72	43	29	144
Korea Resp./ <i>guldeno</i>	12	31	77	46	31	154
Nederlando/ <i>guldeno</i>	16	39	97	61	41	194
Norvegio/krono	60	150	380	230	150	760
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	38	190
Pollando/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100
Portugalia/eskudo	900	2300	5800	3700	2500	11600
Slovakio/krono	135	340	850	510	340	1700
Sud-Afriko/ <i>guldeno</i>	14	35	88	53	35	176
Svedio/krono	70	170	425	255	170	850
Svislando/franko	12	31	77	46	31	154
Usono/dolaro	9	22	55	33	22	110
TARIFO A/ <i>guldeno</i>	10	26	64	38	25	128
TARIFO B/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	20	100

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*


SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Reagoj



Pri movado

La 26-a de julio: Esperanto-tago?

Estus bone se oni povus starigi Esperanto-memortagon, kiu fariĝus por e-istoj okazo por plifortigi la senton de identeco kaj por allogi novajn adeptojn. Mi kredas ke la 26-a de julio, oficiale aprobita eldondato de la Unua Libro, kiu ofte okazas dum la UK, estas la plej taŭga por kapti la atenton de la ekstera mondo. Ni tiam povus rememorigi niajn konatojn (ne nur e-istajn) pri la progresoj de la E-kulturo, kaj samtempe revigligi la tradicion de Tago de Libro, donacante E-literaturaĵojn. Tiu tago povus fariĝi ankaŭ nia nove stari-gota Ago-Tago, kiu ankoraŭ serĉas regulan daton.

Max Wearing (Aŭstralio)

Nek majstra nek por-Esperanta

Esperanto (okt. '94, p. 161) aperigis parton de la por ni interesa ĉapitro, "La mondhelplingvoj", el *La serĉado de perfekta lingvo* de Umberto Eco. Mi disponas el la libro nur tiun ĉi ĉapitron, en germana traduko, kaj mi nepre ne taksas ĝin tre pozitiva por E-o. Kiam mi legis tiun Eco-aĵon, kiu ne trairis la Esperantan memtrompan "cenzuron", mi tuj seniluziĝis.

Unue, Eco tute ne uzas (ne konas?) la modernan interlingvis-tikan terminologion. *Planlingvo* nenie aperas, nur "artefarita", "internacia", "mondhelpa" lingvo. Kiun impreson havas leganto? Ke Esperanto estas nenatura.

Due, Eco ne diferencigas inter planlingvoprojekto kaj planlingvo. Oftege li uzas vortojn kiel "povus", "provas", kiam temas pri la apli-kado de "Internacia Helplingvo" (IHL), kvazaŭ ne jam ekzistus la vivanta kaj uzata Esperanto. Pri la "politikaj ebloj de IHL" li skribas ne entuziasme, "kvazaŭ unu el ni" (R. Corsetti, nov. '93, p. 181), sed, kontraŭe, vere rezerve.

La serĉado... estas nek sciencista majstroverko nek vere por-Esperanta libro.

Marcus Sikosek (Germanio)

Kial do batali?

Kara "vundita esperantisto" (dec., p. 209), mi ne intencas kompletigi viajn klarajn vortojn. Mi nur konstatas: Zamenhof kreis la lingvon por ke la homoj povu interkompreniĝi, uzu ĝin praktike. Mi faras tion de 45 jaroj, verkante kaj tradukante; kaj mi uzis ĝin por milmilfoja korespondado kaj babilado. Sed mi ankaŭ gvidis dekojn da kunsidoj en kongresoj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiun mi prezidis dum 22 jaroj. Mi havis nek emon nek tempon okupiĝi pri skoloj kaj aliaj bataloj. Kaj kial do? La reguloj donitaj de Zamenhof ekzistas. Laŭ ili ni uzu la lingvon, kaj ni estos komprenataj.

Joachim Giessner (Germanio)

Ĉu mi kabeu?

Hazarde iu bonintenca homo rekomendis: eklernu Esperanton! Mi lernis: sola, pene. Mi deziris apliki la lingvon. Mi vizitis grupkunvenojn, eĉ kongreson. Mi profundigis en Esperantujon. Neesperantisto diris ke mi iĝis stranga, ke mi estas sektulo. Mi eĉ perdis neesperantistajn amikojn. Ĉu mi finfine kabeu?

Manfred Klatt (Germanio)

Adiaŭ

Mi tute samopiniis kiel Philippe Cousson (dec., p. 209). Ankaŭ mi sentas min vundita kaj forpuŝita de la memelektitaj bonzoj* de la esperantistaro. Dum daŭros tia inkvizicio, mia nomo ne plu aperos sub kontribuajoj en internaciaj Esperantaj revuoj. Plie, ne plu vidiĝos sur iliaj paĝoj artikoloj verkita de miaj kolegoj, Garvan Makaj, GMA, Girvan MacKay, Aodhair Sratha, Gunsha Máckay,

GCM, aŭ Ĉako Listopad. Mi salutas kaj adiaŭas.

* Ne mi aljuĝis la titolon, sed nia kara antaŭ nelonge forpasinta amiko, Reto Rossetti.

Garbhan MacAoidh (Irlando)

Pri politiko

Radikaluloj ≠ Listo Pannella

Responde al Georgo Kamaĉo (dec., p. 209):

Radikala Partio (RP) estas transnacia, do ĝi ne partoprenas en naciaj balotoj. Ĝi estas eĉ trans-partia, kio signifas ke RP-anoj povas aniĝi en alia partio, eĉ fondi novan partion — je sia nomo, ne je la nomo de RP. Tiel la RP-ano Marco Pannella, liberalulo, fondis je sia nomo en Italio la liberalan partion "Listo Pannella — Reformistoj" (LPR), kiu partoprenis en la naciaj balotoj. Ĝia alianco kun "Ek Italio" de Berlusconi kaj kun Norda Ligo estis starigita pri la temoj de 13 italaj referendumoj de la kluboj "Pannella — Reformistoj". Poste apogis la 13 referendumojn ankaŭ la partio Nacia Alianco.

"Esperanto" Radikala Asocio (ERA) estas asocio de RP, ne de LPR, kiu estas tute alia afero.

Guido Gentile

Sekretariejano de ERA (Italio)

Pri lingvo


Neologismoj: simpla afero

La aserto de M. Boulton ke "la afero pri neologismoj ne estas simpla...", (okt., p. 168) ne estas tute prava. Esence, tiu afero estas simpla. Por forigi esprimmankon oni turnas sin unue al esperant-lingvaj elementoj; nur kiam tia strebado ne sukcesas, oni sin turnas al mortintaj aŭ naciaj lingvoj.

Iaj malfacilaĵoj pri neologismoj estas kaŭzitaj de du homspecoj. Tiu kiu konfuzas lingvoscion (aŭ klercon) kun elitismo; kaj tiu kiu tiel elkondiĉigis per sia multjara studado de mortintaj aŭ naciaj lingvoj ke li mense enkarceriĝas en ties kadroj. La unua konsciĝu pri sia egoismo; la dua, parolante aŭ verkante en Esperanto, pensu kaj pensadu esperantlingve.

Arthur Jackson (Britio)

Fake



Fervojistoj: Fervoro en Rumanio

La 5-an jarkunvenon de Rumana E-a Fervojista Asocio (2-4 sept., Predeal) ĉeestis ĉ. 70 personoj, i.a. la rumanaĵ ministro pri transporto kaj vicministro pri eksteraj rilatoj. La ministro proponis ke oni organizu E-kurson en lia ministerio. En la bulteno de la rumanaĵ fervojoj laŭplane aperos duonpaĝa rubriko pri Esperanto.

En *Pruga*, organo de la serbaj fervojoj, aperadas en tutjara daŭro 30-leciona E-kurso de Gvozden Sredić por fervojistoj (*Internacia Fervojisto*). Sredić ankaŭ tradukis parton de nia decembra intervjuo kun Reinhard Selten por la prestiĝa semajngazeto *Ekonom-ska politika*.

Katolikismo: La papo Esperante

Papo Johano Paŭlo la 2-a, kiu en sia pasintjara paska saluto jam uzis Esperanton (majo, p. 87), deziris esperantlingve "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron" en sia multlingva Kristnaska mesaĝo la 25-an de decembro. (C. Sarandrea)

Komerco: Komuna kompanio?

La Hebei-a E-Asocio (p/a ĝen. sek. Liu Zhi-ming, 22 Youyi Nan Dajie, CN-050081, Shijiazhuang, Hebei, Ĉinio) serĉas eblojn de komerca kaj turisma kunlaboro, specife por starigi taksi-kompanion kun komuna kapitalo. La provinco Hebei (ĉ. 190 mil km², 60 milionoj da loĝantoj) situas ĉirkaŭ la urbejoj Pekino kaj Tianjin.

Literaturo: "Nobelo" Esperante

Verko de la literatura Nobel-premiito japana OOE Kenzaburo legeblas en Esperanto: la longa novelo "La lukso de la mortintoj" (tr. SIBAYAMA Zyun'iti) aperis en *Postmilita japana antologio* (1988; 63,60 gld. ĉe UEA). Iu roman-rolanto de Ooe "fervore lernis Esperanton, estante mezlernejo". (*Novaĵoj Tamtamas*, HUZIMOTO T.)

Alexander Karkovsky (Usono) artikolis pri Eroŝenko en la ruslingva ĵurnalo *Vestnik*. (*Novjorka Prismo*)

Tuthora elsendo de Estona Radio estis dediĉita la 5-an de nov. al Hendrik Adamson. Pri la estona kaj Esperanta poeto parolis i.a. delegito Kalju Lillepuu. (J. Ojalo)

Ekzistas plano ke la pollingva revuo *Haiku* ("Aria" – Haiku, skr. poczt. 57, PL-00-750 Warszawa 12, Pollando), pri japana kaj orient-azia kulturo, eldoniĝu ankaŭ en E-o. (*Heroldo*)

Medicino: Kontraŭ aidoso

En dutaga seminario (3-4 dec.) de Kroata E-ista Unuiĝo d-ro Helmut Brath prezentis aidoson, ties preventon kaj kuracon al trideko da gejunuloj. E-istoj el 6 landoj sendis flugfoliojn pri aidoso, kaj f-ino Barlaston salutis per vidbenda mesaĝo. Leviĝis ideo eldoni E-lingvan informilon kaj fondi e-istan fakgrupon kontraŭ aidoso. Kontakto d-ron Brath (Morzinplatz 1/7/20, AT-1010 Wien, Aŭstrio) aŭ Marija Beloŝević (Sveti duh 130, Čnomerec, HR-41000 Zagreb, Kroatio).

Informado: Ni legis en novembraĵ revuoj

Le Rotarien, organo de la francaĵ rotarianoj, recenzis jene la libron *Le défi des langues* de Claude Piron: "[ĝi] konfirmas ke la [esperantistoj] faris

intelligentan elekton meze de socio kiu preferas penigan malefikecon al efikeco agrabla". (E. Svane)

La plej konata infan-gazeto de Islando, *Aeskan* ("Juneco"), aperigis dupaĝan artikolon de H. Sæmundsson: "Mi volas fari lingvon, panjo".

"Kial Esperanton, kaj ne la anglan?" – demandis titole la bharata studenta magazino *Catalyst* (maldekstre), kiu lanĉis korespondan kurson de d-ro Ŝirdi Prasad Tekur kaj f-ino Anuparna el Bangaloro. La UK-partopreno de la samurba Sundresh Pradhan donis okazon al la anglalingva *Indian Express* artikoli pri E-o.

Radio: Kelkaj ŝanĝoj


La E-lingva programo de Radio Sarajevo ŝanĝis sian ondolongon: anstataŭ 6980 kHz, validas 7105 kHz (42,2 m).

La elsendo-daŭro de la Budapeŝta E-programo (nur loke kaptebla) mal-kreskis de 30 minutoj al 2 x 10 min. semajne – aliflanke, ĝi "promociiĝis" al la ĉefa hungara kanalo. (L. Szilvási)

La E-Redakcio de Pola Radio (PL-00-977 Warszawa, p.f. 46) komputile registras, ĝis la fino de majo, ĉiujn kiuj deziras senpage ricevi ĝian monatan *Parolas Varsovio en Esperanto*. Ĝia redaktoro Andrzej Pettyn gvidis seminarion pri intervjuado dum la 44-a Kultura Semajnfino de Sarlanda E-Ligo (9-11 dec., Homburg), kies ĉeftemo, "Esperanto en la etero", logis pli ol 100 partoprenantojn el 9 landoj.

Trafiko: Nova kvalito

La ĉeĥa, slovaka, angla, germana, rusa, franca kaj Esperanto estos la laborlingvoj de scienca konferenco (19-21 sept.) ĉe la Trafikfakultato de la Universitato en Pardubice (str. Studentská 84, CZ-530 09 Pardubice, Ĉeĥio; tel. +42/404-36-21; faks. 404-84-00), por kiu oni atendas kontribuojn ĝis la 31-a de marto pri la temo "Nova kvalito en trafiko". (*AEEF-Bulteno*)





Argentino:

Por landskala kunlaboro

Estraranoj de la du tutlandaj asocioj Argentina E-Asocio kaj Argentina E-Ligo kunsidis la 10-an de dec. en Bonaero por kunlabora fortigo de la landa movado.

Ĉeĥio: Delegito donacas

En la dioceza seminario en Olomouc troviĝas biblioteka E-fako, kies bazon formas libroj donacitaj de UEA-delegitino Anna Milatová el Třinec. Ŝi donacis ankaŭ ŝparlibron kun alta

intereso por subteni e-istajn seminarianojn. (M. Bartovská)

Asocio de E-istaj Handikapuloj kaj la E-klubo de Pardubice havis standon inter 300 senprofitaj organizoj en la ekspozicio "Homoj al homoj" (1-3 dec., Prago). (J. Mařík)

Estonio: Norvegoj donacas

E-Asocio de Estonio ricevis de Norvega E-Ligo 12 mil kronojn (ĉ. 3 mil gld.) por aĉeto de kopiilo, ĉefe por produkti instrumaterialon. (Norvega Esperantisto)

Francio:

Helpema eŭro-parlamentano

La urbestro de Villeneuve d'Ascq, eŭro-deputito Gérard Caudron, akceptis la 22-an de okt. kvin-personan delegacion e-istan. Li deklaris sin preta disdoni E-dokumentojn en la Eŭropa Parlamento kaj kolekti la nomojn de Esperanto-favorantoj tie. (NordGazeto)

Hungario:

Ministra letero

Al la Ago-Taga alvoko de Kultura E-Asocio (dec., p. 201) rapide respondis kultur-ministro Gábor Fodor: "Mi opinias ke la postuloj de la labormerkato baldaŭ diversigos la nuntempe unuflankan interesigon en la kampo de lingvolernado. . . . Pri la utileco kaj uz-ebloj de Esperanto la vasta publiko estos espereble plej taŭge informata fare de KEA."

STR-ANGULO

Stranga heredaĵo

Germano mortinta en 1984 kaj nekonsata al esperantistoj, testamentis sian havaĵon, valoran je miliono da markoj, al "la militistaj invalidoj, escepte de oficiroj, generaloj kaj profesiaj armeanoj"; se tio ne eblus, ĉio iru al "la germanaj esperantistoj". La tribunalo de unua instanco trovis la unuarangan disponon ne sufiĉe precize vortumita, kaj aljuĝis en 1988 la heredaĵon al Germana E-Asocio, rekonante ĝin kiel tegmentan organizon de "la germanaj esperantistoj". Tamen, post plendo de malproksimaj parencoj de la mortinto, la tribunalo de la federaciana lando Berlino atribuis la heredaĵon al la "militistaj invalidoj" — praktike al la lando Berlino. (Esperanto-Aktuell)

buis la heredaĵon al la "militistaj invalidoj" — praktike al la lando Berlino. (Esperanto-Aktuell)

Eĉ el sub la tero...

Memlerninto de Esperanto vizitis la katalunan kongreson de 1993 por konatiĝi kun sia germana leteramiko. Montriĝis ke dum la tri jardekoj de sia esperantisteco li ankoraŭ neniam aŭdis aŭ parolis la lingvon! Ĉar li aperis ĝuste kiam ĵurnalistino intervjuis la aktivulon Xavier Margais, tiu facile evitis la ĉiam tiklan demandon pri la nombro de esperantistoj, dirante: kiu povas scii kiom da katakombanoj ekzistas? (Kataluna Esperantisto)

Verda Armeo?


En 1988 la tiam 93-jara latvo Krišjānis Žubīte, iama komisaro de la Ruĝa Armeo, rakontis jene:

Komence de la 20-aj jaroj leviĝis la demando en kiu lingvo la ruĝarmeanoj parolos en Okcidenta Eŭropo, se necesos tie interveni apoge al proleta ribelo. Laŭ Žubīte, en 1921 oni ordonis al la tuta personaro (!) de la Ruĝa Armeo lerni Esperanton. Pri la plenumo respondecis la komisaroj. Ankaŭ Žubīte ricevis lernolibron kaj komencis kurson. La lecionoj (du horoj semajne) daŭris ĝis 1923. Lia entuziasma 40-persona grupo bonege ellernis la parolan lingvon. Sed post kiam en 1923 Žubīte devis disiĝi de sia regimento, li nenion plu aŭdis pri la sorto de Esperanto en la Ruĝa Armeo. (Sennaciulo, laŭ Ogonjok)

Ĉio transmara — ĉarma kaj kara

Ofte venas al Rusia Esperantista Unio leteroj dirantaj "mi ricevis vian adreson de la usona Esperanto-asocio . . .". Ĉu Esperanto-Ligo por Norda Ameriko pli bone informadas en Rusio ol REU mem? Ne. La sciencfikciaj verkoj de Harry Harrison, Honora Patrono de UEA, estas tiom fidele tradukitaj en la rusan ke la postparolaj informoj pri Esperanto donas eĉ la adreson de ELNA. (Movado)

Ankaŭ UEA ricevis lastatempe "malrektan" leteron el Rusio. Afable peris ĝin la Turisma Oficejo de Ĝenevo, kies sidejo situas je "1 Tour de l'Île" — la svislanda adreso kiu aperadis en niaj Jarlibroj ĝis 1937. . . .



De loko flugis ĝi al loko

Aviadilo el la granda brazila urbo Curitiba celis al San-Paŭlo. Kelkajn minutojn post la desurteriĝo japana pasaĝero ekkriis: "Babela turo . . . Neniu parolas Esperanton!" Venis respondo: "Kara samideano, mi salutas vin. Ankoraŭ mi estas komencanto, sed mi jam komprenas . . ." La japano leviĝis kaj brakumis la brazilanon Cesar Reis, kiu unuafoje parolis Esperante kun alilandano. (Komunikoj de SES)

Hungaria E-Asocio starigis Centron de Esploro kaj Dokumentado, kies taskoj prioritare koncernas temojn ligitajn al Hungario. CED-HEA kunordigas sian laboron precipe kun la hungara Unesko-komisiono kaj kun CED de UEA.

Kolombio: Furoraj lerniloj

Pli ol 150 personoj aŭskultis prelegojn kaj eĉ rokmuzikon en Esperanto en la 3-a Kolombia Renkontiĝo de Esperanto (12-14 nov., Cali). Santiago Álvarez proponis renkonton de kolombiaj kaj venezuelaj esperantistoj por 1996, en Karakaso.

Pli ol 2000 kolombiaj librejoj vendas la kunkasedajn lernilojn de Luis Jorge Santos Morales, *Esperanto — Unu mondo, unulingvo* (1986) kaj *Lalingvo por amikiĝi* (1993), kies lernantoj nun organizas klubojn en kvar urboj. (J. E. Bachrich)

Kubo: Scienca seminario

La Scienc-Teknika Komisiono de Kuba E-Asocio (p.k. 5120, CU-10500, C. Habana; tel./faks. +53/7/338-729) invitas al Seminario pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (SAEST) kaj samtempa Dua E-a Medicina Kunvido (18-20 majo, Havano). Proponatajn prelegojn — ankaŭ pri instruado kaj familia uzo de Esperanto — sendu ĝis la 30-a de marto.

Rusio: Sukceson al Sukceno!

Skribas klubestro Aleksandr Gluĥov (p.k. 659, RU-236010 Kaliningrad, Rusio): “la E-mondo plejparte ne scias ke en nia urbo, kiu fakte situas meze de Eŭropo, funkcias E-klubo”. Ĝi “bonvenigas gastojn, petante pro niaj servoj nur iom da propagando de Esperanto”.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

En televida ludo la esperantistoj Valentin Melnikov kaj Tatjana Lugovskaja gajnis milionon, resp. duonmilionon da rubloj (ĉ. 800, resp. 400 gld.) en septembro. (*Movado*)

Svedio: Informa trafo

La revuo *La Espero* de Sveda E-Federacio oportune trafis la aŭtunajn eŭro-debatojn en la lando: ĝia tute svedlingva numero (1994/3-4), okulfrape titolita “Svedio kaj EU? Je kiu prezo?”, informas pri E-klubo kaj mendindaj libroj, provizas skizon de la gramatiko, kaj enhavas elpreneblan E-aŭŝon.

OFICIALA INFORMILO

SOCIETO ZAMENHOF 1994

Francio: Jean Amoureux. Usono: Karlo Donoghue; Gertrude Novak.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA 1995

PATRONOJ (minimumo \$100): Japanio: Nobuo Sakurai.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Brazilo: C. de Moraes Lemos. Nederlando: Edwin Burg.

AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: Stan J. Bruton.

PATRONOJ DE TEJO 1995

Francio: Bérengère Cheverry; Jean-Claude Martignon; Jean Dalet; Jacques Decobert; Paulette Naulet. Israelo: Josifa Rabino. Japanio: Bun'iti Isizaki. Nederlando: W.F. Hupertz; Louise Adelaar.

SOCIETO ZAMENHOF 1995

Aŭstralio: Nassif Isaac. Aŭstrio: Sieglinde Stamm. Belgio: Elfriede Ernst. Finnlando: Aleksi Romonen; Eino Pynnönen. Francio: Jean Amoureux; André Loisel; Pierre Guérout; Henriette Cortes; Hélène Gauducheau; Jack-André Rousseau; Jean-Paul Beau; Louise Marin; Pierre Métivier; Julien Ducrocq; Yvette Vierende. Germanio: Albrecht Kronenberger. Japanio: Hiromasa Onda; Bun'iti Isizaki; Ivao Katō; Mouam Eun; Keniti Matumoto; Osaki Kazuo; Nobuo Sakurai; Sunao Simada; Hiroshi Takahasi. Nederlando: A.A. Laverman; Hans ten Hagen; Louise Adelaar; S. Mensen; N.H. Koppers; W.A. Verloren van Themaat. Svedio: Herbert Lindros; Malte Smith; Tomas Jansson. Usono: Arnold Victor; Gertrude Novak; Humphrey Tonkin; Jane Edwards.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Germanio: Prof. d-ro Rokuro Makabe. Israelo: Z. Kurolap. Svislando: E. Lauper.

DONACIOJ 1994 (gld.)

ĝis la 31-a de decembro

(La tutjaraj sumoj indikas ne la staton de la koncernaj kontoj/fondaĵoj sed la sumon de la donacoj en 1994.)

Asocia Kapitalo: Sumo tutjara 110 401,85.

Fondaĵo Afriko: Nederlando: Fam. Bossong 11,56; R. Moerbeek 100,00. Svedio: J. Hammarberg 13,73. Diversaj malgrandaj 5,61. Sumo tutjara 7838,01.

Fondaĵo Ameriko: Diversaj malgrandaj 4,77. Sumo tutjara 2096,32.

Fondaĵo Azio: Sumo ĉi-jara 86,00.

Bjalistoka E-Centro: Sumo tutjara 35,25.

Konto Ĉinio: Nederlando: E. Burg 100,00; R. Moerbeek 100,00. Sumo tutjara 775,00.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: J. Bishop 30,00. Britio: P.A. Danning 88,00; W.F. Simcock 10,00. Finnlando: B. Eriksson 131,35. Francio: J.J. Aumeunier 29,11; G. Boissière 48,52; J. Ducrocq 242,60; R. Gonin 60,00; C. Haren 32,34; P. Leroy 64,69; L. Marin 64,69; B. Robineau 54,99; J. Seguin 32,34; J.-M. Vidonne 16,17. Germanio: S. Maul 10,00; M. Westermayer 20,00. Italio: D. Masterman 30,00. Japanio: (por aziaj e-istoj) K. Hayasi 35,13; Y. Izumi 35,19; A. Kagami 35,19; M. Katogi 100,00; K. Kazawa 35,19; S. Miyamoto 35,19; S. Nagakura 70,26; T. Nisio 100,00; T. Nomura 35,13; Y. Ootuka 35,19; Y.+T. Takeuti 35,19; H. Tani 35,13; K. Waki 35,19; S. Yamasaki 35,19; E-Grupo de Saga 35,19. Nederlando: J. Bosse-Sibbel 53,00; E. Burg 200,00; A.A. Laverman 106,00; E.M. Maasbommel 200,00; A.J. Middelkoop 500,00; R. Moerbeek 200,00; G.C.M. Schavemaker 11,00; B.M. Slösser 100,00; R. Slot 250,00; A. Tebbenhof 25,00. Nov-Zelando: Anonime 489,60; G.D. Dewar 56,12. Usono: G. Novak 43,25. Sumo tutjara 23 323,51.

Ĝenerala Kaso: Aŭstrio: S. Stamm 124,02. Francio: J. Amoureux (por Societo Zamenhof) 1016,20. Germanio: H.G. Strauss 111,77. Nederlando: E.M. Maasbommel 200,00; M. Meijwes 500,00; A. Tebbenhof (por Societo Zamenhof) 25,00; A.W. Treurniet 58,00; Harlema E-Grupo 25,00; Roteradama E-Societo Merkurio 500,00. Nov-Zelando: Anonime 489,60. Svedio: U. Luin 120,14. Svislando: L. Schaerer 130,06. Sumo tutjara 15 372,71.

Fondaĵo Grabowski (en usonaj dolaroj): Sumo tutjara 568,75.

Biblioteka Fondaĵo: Sumo tutjara 45,70.

Konto Espero: Britio: A. Vincent-Jones 68,75. Francio: H. Cortes 38,82; C. de Coudenhove 32,34; J. Ducrocq 323,47; P. Godfrin 64,69; C. Haren 32,34; L. Marin 64,69; J. Seguin 32,34; Germanio: H.G. Strauss 111,76. Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Svislando: E. Lauper 39,02. Diversaj malgrandaj 0,32. Sumo tutjara 4 737,99.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: A.A. Laverman 100,00. Sumo tutjara 10 285,75.

Propaganda Konto: Nederlando: E. Burg (por CED) 100,00. Diversaj malgrandaj 4,77. Sumo tutjara 228,01.

Pasporta Servo: Nederlando: E. Burg 100,00. Sumo tutjara 638,30.


Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: W.F. Simcock 10,00. Germanio: E. Blasius 45,00; M. Westermayer 20,00. Italio: D. Masterman 13,00. Nederlando: A. Wester-v.d.Veen 25,00. Sumo tutjara 5 965,92.

Volontula Fondaĵo: Aŭstralio: J. Bishop 30,00. Britio: W.F. Simcock 10,00. Germanio: E. Blasius 40,00. Italio: D. Masterman 10,00. Nederlando: E. Burg 100,00; E.M. Maasbommel 200,00. Sumo tutjara 1 200,10.

Tre koran dankon al ĉiuj!

UEA

Anoncetoj



Brazila antologio poezia — Ĵus aperinta, 32 poemoj, 120 poetoj, tradukis Lorenz. 452 paĝoj. Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, 20001 Rio-de-Janeiro, Brazilo.

Naskiĝis nia fileto **Ville**, la 4-an de januaro 1995, en Vaasa, Finnlando. Maria Sandelin, Kalle Kniivilä.

15-jaraj mezlernejaninoj volus havi leteramikojn. Vanda Čiègytė, Kosmoso 44-2, LT-4761 Visaginas, Litovio.

Bv. sendi bildkartojn, salutleterojn, turismajn prospektojn, esperantajn por internacia letervespero: Rondo de Pola Esperanto-Asocio, P.O.K 30, PL-34-120 Andrychów. Respondo garantiita.

Kongreso de gente duonigitaj urboj de la 21-a de aprilo ĝis la 2-a de majo 1995. Petu pliajn informojn ĉe Esperanto-rondo de Bielo, Poŝtkesto 3163, CH-2502 Bielo-3, Svislando. Tel. +41/32-22-00-65.

Ĉu iu trovos kaj sendos al ni la **unuan numeron de Litova Stelo**, el 1914, aŭ kopion? Adomas Vaitilavičius, redaktoro de *Litova Stelo*, p.d. 178, LT-2000 Vilnius, Litovio.

S-ino Yao Guangying kaj S-ro Zhu En (Xichengxia 10-hao, CN-317000 Linhai, Zhejiang, Ĉinio) geedziĝis la 20-an de dec. en Qianshan, fondante la **unuan E-familion en sia loko**. Ili deziras korespondi pri lingvoinstruado al infanoj, turismo kaj komerco.



NEKROLOGOJ

Rita AAGAARD (1911-1994), delegitino en Aŭklando, mortis la 30-an de septembro. Ŝi instruis kaj aktivis en la loka klubo dum 34 jaroj kaj funkciis kiel ekzamenisto de la brita kaj nov-zelanda E-asocioj.



Rita Aagaard

Igor COLONNA VALEVSKY (1921-1994), fakdelegito pri matematiko, forpasis antaŭ nelonge en Divinópolis (Brazilo).

Marko DEMETROVIĆ (1909-1994) mortis la 21-an de novembro en Zagrebo. E-isto ekde 1928, ofta kursestro, li kunredaktis ekde 1933 la revuon *Suda Stelo*, kie aperis pluraj liaj tradukoj.

Ann-Gerd ENGBERG (1929-1994), estraranino de la klubo en Norrköping (Svedio), pereis en la katastrofo de la ŝipo Estonia sur la Balta maro, la 28-an de septembro.

James FONSECA (1923-1994) mortis la 20-an de decembro en Thousand Oaks (Kalifornio). Lingvo-instruisto, li donis bazajn E-kursojn al universitatanoj inter 1987 kaj 1990, estis samperiode estrarano de E-Ligo por Norda Ameriko, kaj en 1993 ekprezidis Amerikan Asocion de Instruistoj de E-o.

Sylvia HILL (1912-1994), fakdelegitino, inform-oficisto de Nov-Zelanda E-Asocio, forpasis en Aŭklando la 5-an de oktobro.

Éliane JOLLY (1937-1994), delegitino en Beaufays (Belgio), mortis la 10-an de septembro.

Leon KLODECKI (1912-1994), E-instruisto kaj fondinto de la Bjalistoka filio de Pola E-Asocio, forpasis la 7-an de aŭgusto.

Nydia Aydos KRIEGER (1923-1994), dumviva membro el Porto Alegre (Brazilo), mortis la 5-an de oktobro.

Nel MUNNIKSMA-BOLLEN (1915-1995), vidvino de Feiko Munniksma kaj mem aktiva movadano, forpasis la 7-an de januaro en Nederlando. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi donacis al UEA valoran librokolekton.

Adam PAŬLUKAVEC (1939-1994) forpasis en Minsk la 28-an de oktobro.


Li agadis dum sia tuta vivo kiel kursgvidanto, propagandisto kaj estrarano de kluboj kaj asocioj. Li tradukis multe el la bjelorusa poezio, kaj verkis la unuan bjelorus-lingvan E-lernilon, *Mova Esperanta* (1992).

Claudio Luiz STEHLING (1952-1994), vicdelegito en Niterói (Brazilo), mortis antaŭ nelonge.

Martin TOVORNIK (1909-1994) mortis la 2-an de decembro en Rogaska Slatina (Slovenio), kies E-societon li prezidis.

József VÉCSEY (1904-1994) forpasis la 22-an de novembro en Novi Sad (Jugoslavio), kie li aktivis ekde sia esperantistiĝo en 1923. Antaŭ la milito li iniciatis fondon de pluraj E-societoj en Vojvodino kaj en 1947 refondis ties E-Ligon (VEL). Li gvidis sennombrajn E-kursojn kaj plenumis diversajn funkciojn en VEL kaj Jugoslavia E-Ligo. De 1947 ĝis 1986 li estis delegito.

Mladen VRTUNSKI (1906-1993), e-isto ekde 1922, forpasis komence de decembro 1993 en Novi Sad (Jugoslavio), kie li kunfondis la lokan klubon. Li organizis kursojn, ankaŭ kiel kaptito dum la dua mondmilito en Nurenbergo (1941). Aperis serblingve du liaj libroj pri travivaĵoj en la koncentrejo Dachau.



Institucio Hodler '68 akceptas pruntojn sen rento aŭ kun rento de 2% aŭ 5% por investi profite al gravaj movadaj projektoj. Ankaŭ donacoj estas bonvenaj.


Pasintjare la subvencioj sumiĝis je 7500 gld. Informiĝu ĉe UEA!

ESPERANTO-KURSO EN VIDEO

por hispanlingvanoj – de Enrique Kohei
praktika moderna lernilo

Prezo por la tuta kurso (inkludita afranko) 50,- gld.

Mendu de Marta Solís (UEA-konto mso-z): C. Correo 407 – 2600 Venado Tuerto – Argentino. (Menciu la sistemon de la video.)



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto
por ĉiu, kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KONTAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1995 **KONTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.

ABONTARIFO 1995

Aŭstralio	30 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	30000 liroj	Svedio	170 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj



TEJO lotumos valorajn premiojn
inter ĉiuj abonantoj. Bonŝancon!



2^a ESPERANTO EŬROP-UNIA KONGRESO

PARIZO 2^a/6^a JUNIO 1995
MONTROUGE

el la programo: ĉeftemo: NIA EŬROPO
teatraj kaj varieteaj eventoj – bankedo –
balo – festparolado de C. Piron –
prelego de G. C. Fighiera – ekspozicioj –
libroservo – urbovizitoj – kunveno de
EŬROPA ESPERANTO-UNIO

Konstanta adreso: 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton,
donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio
de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.
Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto
kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko,
CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo,
1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

La Kosmologio de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al
pozitiva vivsinteno – kaj al pacaj
kaj harmoniaj rilatoj inter homoj.
Legu pri la kosmologio en la nova
revuo KOSMOS.

Petu senkoston provkzempleron
ĉe Martinus-Instituto, Mariendals-
vej 96, DK-2000 Kopenhago F,
Danio. ☎ +45 3834 6280 – Fakso
+45 3834 6180

Nenia unuiĝo aŭ membreco



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON – F-49150 BAUGÉ
telefono : 41 89 10 34

Kulturaj Aranĝoj 1995

- 15/04 – Printempa renkonto de infanoj
- 22/04 – Kursoj, promenadoj, distraĵoj, studo de la ĉirkaŭa naturo, inicado al metiaj laboroj. Se venos sufiĉe da partopreno-proponoj, dua renkonto estos organizita, sub gvido de Monika Noël.
- 22/06 – Kursoj je 1-a kaj 2-a nivelo
- 07/07 – Man-aktivaĵoj, komunaj promenadoj, distraĵ vesperoj.
- 08/07 – Kursoj trinivelaj
- 22/07 – La unua semajno de la dua-nivela kurso konsistos el (re)aktivo de la konoj, kaj la dua semajno el praktika konversacio. Okazos prelegoj pri la 100-jara datreveno de kinarto kaj pri la influo de la mondmilito sur la Esperanto-movado.
- 23/07 – Kursoj trinivelaj
- 05/08 – Georges Lagrange gvidos semajnon pri la “arto traduki”. Kimie Markarian organizos “Japanan semajnon”.
- 05/08 – Kursoj trinivelaj
- 19/08 – Unu semajno estos dediĉita al “praktika pedagogio”.
- 19/08 – Kursoj
- 31/08 – Diversaj aktivaĵoj.

Eblas organizi ekskursojn al la multaj regionaj vidindaĵoj laŭ la elekto de la ĉeestantoj. Libro-bindado, korb-farado kaj aliaj metiaj laboroj estas antaŭviditaj. Nia libro-servo disponigas al la ĉeestantoj la necesan materialon por studi kaj lerni. Vi rajtas jam peti la katalogon. Fine de ĉiu periodo estas eblo organizi ekzamen-sesion. Kandidatoj sin anoncu. Konfirmo de rezervado nur kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono.

*“Se ekzistus en la realo la lando Esperantujo,
jen unu el la tekstoj, kiujn oni certe legus
en ĉiuj mezgradaj lernejoj.”*

RENATO CORSETTI



La nova 18-a eldono, prinotita de prof. G. Waringhien, faras maksimumajn klopodojn tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954.

18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj kromkovrilo. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde 3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

POCKET ESPERANTO DICTIONARY

ENGLISH-ESPERANTO ESPERANTO-ENGLISH
by Andrew McLinen, 1992, 402 pages, 105 x 145

The most up-to-date
and comprehensive
dictionary with over
50,000 translations

from


LINGUA PUBLICATIONS
81-470 Gdynia, Poland
Powst. Wielkopol. 76 B 11

Mendu ĉe la Libroservo de UEA
Prezo: 28,50 gld. + 10% sendokosto

ABONU KAJ ABONIGU EL POPOLA ĈINIO

Unu el la plej popularaj revuoj en la internacia Esperanto-Komunumo, distribuata de la Redakcio ekde 1994

- 12 numeroj jare, kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj
- Informoj pri la Esperanto-movado tra la mondo
- Esperanto-rubrikoj “Voĉo de Esperantistoj”, “Por Komencantoj”, “Inter Ni” k.a.
- Aktualaj raportoj pri la progreso kaj socia kaj popola vivo de nuna malferma Ĉinio
- Interesaj artikoloj pri la tradicia kulturo, historio, literaturo, arto, medicino, filozofio, k.a. de ekzotika Ĉinio



Abontarifo por Eŭropo: 1 jaro 51,00 NLG 26,00 USD

Abonu ĉe UEA kaj EPĈ-perantoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto: Distribua Fakto de EPĈ, P.O. Kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.